HUNGARA VIVO

I
1977
8.- Ft

LA PERANTOJ DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

AUSTRIO: GLOBUS (VAZ) Höchstädtplatz 3, 1200 WIEN XX.,

AUSTRALIO: C.B.D. LIBRARY AND SUBS. SERVICE, Box 4886, G. P.O. SYDNEY, N.S.W. 2000

COSMOS BOOKSHOP, 145 Ackland Street, ST. KILDA 3182 READ AND CO., 694—696 George Street, SYDNEY N. S.W. 2000

BELGIO: AGENCE MESSAGERIE DE LA PRESSE, 1 Rue de la Petit-Ile 1070 BRUXELLES

OFFICE INTERNATIONAL DE LIBRAIRIE S. A., Avenue Marnix 30, 1050 BRUXELLES

BRAZILIO: LIVRARIA D. LANDY LTDA, Caixa Postal 7943, 0100 SAO PAULO

BRITIO: BRITA ESPERANTISTA ASOCIO, 140 Holland Park Ave., LONDON W11 4UF

COLLET'S HOLDINGS LTD., Denington Estate, WELLINGBOROUGH, Northants NN8 2QT

THE DANUBIA BOOK COMPANY, 58. Chatswort Road, LONDON NW2 4DD

BULGARIO: DIREKZIA REP, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: MAĎARSKA KULTURA, Narodni Třida 22, 115 66 PRAHA I.

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tisku, Vinohradská 46 PRAHA

POSTOVA NOVINOVA SLUZBA — dovoz tlace, Leningrádská 14, BRATISLAVA

ĈINIO: CNPICOR, P.O.B. Nr. 88, PEKING

DANLANDO: MUNKSGAARD'S BOGHANDEL, Norregade 6, 1165 KOBENHAVN K.

FINNLANDO: AKATEEMINEN KIRJAKAUPPA, Keskuskatu 2, 00100 HELSINKI 10.

FRANCIO: AGENCE LITTERAIRE ET ARTISTIQUE PARISIENNE, 23 Rue Royale, PARIS 8.

SOCIÉTÉ BALATON, 12 Rue de la Grange Bateliere, 75 PARIS IXe

G.D.R.: ZEITUNGSVERTRIEBSAMT, Strasse den Pariser Kommune 3—4, 1004 BERLIN

G.F.R.: VERLAG Hans LEIPNITZ, Hölderlinstrasse 10, 6 FRANKFURT 1.

H.W.E. SAARBACH GMBH, P.O.B. 101610, 5 KÖLN 1.

HINDIO: NATIONAL BOOK AGENCY PRIVATE LTD., 12 Bankim Chatterjee Street, CALCUTTA

ISRAELO: LEPAC LTD., 15 RAMBAM Str., TELAVIV

ITALIO: LIBRERIA COMMISSIONARIA SANSONI, Via Lamarmora 45, Casella Postale 552, 50121 FIRENZE

SO. CO. LIB. RI., Piazza Margana 33, 00186 ROMA

JAPANIO: MARUZEN CO. LTD., P. O. Box 5050 TOKYO INTERNATIONAL, 100—31.

NAUKA LTD., 2—30—19 Minami-Ikebokoro, Toshima-ku, TOKYO 171.

JUGOSLAVIO: JUGOSLOVENSKA KNJIGA, Terazije 27, BEOGRAD

PROSVETA EXPORT—IMPORT, P.O.B. 555, Terazije 16/1, 11001 BEOGRAD

KANADO: PANNONIA BOOKS P.O. Box 1017, Postal Station „B" TORONTO Ont. M5T 2T8

DÉLIBÁB FILM AND RECORDS STUDIO, 19 Prince Arthur Street west. MONTREAL 130 P.Q.

KOREO: „CHUIL U", PHENJAN

KUBO: INSTITUTO CUBANO DEL LIBRO, Obispo 461, HABANA

NEDERLANDO: UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM 3002

NORVEGIO: A/S NARVESENS LITTERATURTJENESTE, Box. 6140, OSLO 6.

POLLANDO: B. K.W.Z. RUCH, ul. WRONIA 23, 00—840 WARSZAWA

RUMANIO: D.E.P. BUCURESTI

D.E.P. ARAD

SOVETUNIO: POCHTAMT—IMPORT, MOSKVA

POCHTAMT—IMPORT, LENINGRAD

SVEDIO: NORDISKA BOKHANDELN, Alströmergatan 22, 101—10 STOCKHOLM

SVISLANDO: AZED AG. Dornacherstrasse 60—62, BASEL 4002

MEROPOLITAN VERLAG, Teichweg 16, 4142 MÜNCHENSTEIN

USONO: FAM BOOK SERVICE, 69 Fifth Avenue NEW YORK, N. Y. 10003

HUNGARIAN BOOKS AND RECORDS, 11302 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: LUIS TARCSAY, CARACAS, Apartado 50892

VJETNAMO: XUNHASABA, Phong Phat 166 sor n Hanh Bao Chi, 17 Dinh Le HANOI, RD

E HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro István Nagy
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, Mária Rózsa Szabó, Tibor Ujlaki-Nagy, Zsuzsa Varga-Haszonits

Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: D-ro Péter Suth direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

76-6204 Somogy m. Ny. 3300
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377
ISSN 0018—7704

F/330

E HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf.: 193.
Aperas dumonate
XVI. jaro 1977. 1-a numero

Numero pri la hungara filmarto

ENHAVO

Ervin *Gyertyán:* La hungara filmo 1
Zoltán *Zelk:* Poemoj — Tr. M. Fejes 3
Jenő *Heltai:* Kino — — Tr. M. Fejes 3
Vilmos *Benczik:* Pri la filmoj de Miklós Jancsó 4
Zs. *Varga—Haszonits:* Sciigoj el la hungara filmomondo 5
András *Kovács:* Antaŭparolo 6
P. *Balkányi:* Hungaro, kiu kreis modernan filmindustrion 7
vhzs: La kvina sigelo 7
Gy. *Hernádi*—M. *Jancsó* — G. *Mdivani:* Internaciistoj 8
Panoramo — tr. Szilárd *Bálint* 10
Literatura metiejo—Pri la poemoj de Judit Estók 12
Lajos *Lesznai:* Muzika konkurso en Budapeŝto 13
Interparolo kun prof. M. Simai (Imre *Szenes)* 14
Bertram *Potts:* La nova instruisto 16
Kiel eksterlandanoj povas aliĝi al la Esperanto-fako de la Budapeŝta Universitato? 19
András *Simor:* Parolu por ili! — Tr. Zoltán Gabányi 19
D-ro Ferenc *László:* Medioprotektado — monda problemo 20
Recenzoj — V. *Benczik,* E. *Fenyvesi* 26
Paĝo de FERI' — krucenigmo, Lingvaj ludoj, Šako, Kalendaro 30
Leterkesto, Korespondi deziras 32

Sur la titolpaĝo: Judit Halász, tre populara aktorino

Ervin Gyertyán

La hungara filmo

I.

Kvankam la unua hungara filmo estis produktita en 1901, eble jam en 1898, nia filmarto — filmproduktado sur arta nivelo — komenciĝis sendube nur antaŭ tri jardekoj. Ĝis 1945 la filmado estis konsiderita de hungaraj filmistoj nur tre simpla amuziga industrio, sed elstara laŭ profitebleco. Sekve oni imitis laŭ provinca maniero la sonĝo-fabrikojn de *Hollywood* kaj de la germana UFA, fabrikante larmigajn sentimentalaĵojn, amindumo-komediojn, bazitajn sur ŝercoplenaj dialogoj kaj eleganta husaroficiro aŭ nobela bienulo-dando, kies demokrateco — necesaĵo por la »estimata publiko« — kulminis se li edzinigis la riĉan filinon de burĝa familio.

Esceptoj troviĝis malofte: kelkaj silentaj filmoj, inter la du mondmilitoj ankaŭ parolfilmoj kun artaj pretendoj (*Hyppolito* la lakeo, komedio de I. *Székely;* Homoj sur la Alpo, dramo pionire valorega de I. *Szőts,* meritinta ĉefpremion en *»Biennale« Venecia* en 1942). Post renverso de la Konsilia Respubliko (1919) granda aro da elmigrintaj hungaraj filmistoj multloke manifestis siajn kapablojn. Inter la pleje famiĝintaj ni menciu Aleksandron *Korda* en Anglio, Miĥaelon *Kertész* en Usono; en Germanio laboris Márton *Garas,* J. *Illés,* K. *Lajthai,* la scenaristo Béla *Balázs,* pioniro de la filmestetiko (poste en Sovetio), en Francio filmis Paŭlo *Fejős,* la komponisto Jozefo *Kozma,* en Hispanio L. *Vajda.* Estis karakteriza la anekdoto, laŭ kiu sur pordo de *Hollywoo-a* filmfabriko pendis afiŝo: »Eĉ se vi venas el Hungario, aldone vi devas havi *ankaŭ talenton!*«

La principo, ke filmo estas ne nur ia industrio, sed samtempe, eĉ unuavice *arto,* triumfis en la hungara filmfabrikado nur *post* la dua mondmilito; tuj du filmoj akiris internacian furoron. *Ie en Eŭropo,* la filmo de Géza *Radványi* (kun la scenaristo B. Balázs) pri vagantaj bandoj de senhejmaj infanoj, forpelitaj de la milito kruela; *Eta grundeto* el romano de Pál *Szabó, produktita* de Fr. *Bán,* profunde aflikta filmo pri la intermilita mizero, ekspluato kaj senespera vivo de kampuloj. Tiuj brilaj komencoj — kune kun kelkaj sekvantaj — promesis disvolviĝon al ia vilaĝeca »neorealismo« (pro la cirkonstancoj en Hungario), eventuale paralele kun tiu itala film-skolo. La pluan evoluon en tiu direkto haltigis tamen la kultura koncepto, nomata ĝenerale: *skematismo.*

Ties gvidideo estis koncerne la enhavon, ke la filmo servas nur kiel ilo por rekta agitado; estis negita la specialeco de la filma arto, allasante nur rolon de ilustrilo por la literaturo. En tiu periodo nur kelkaj filmitaj klasikaj romanoj kaj biografioj leviĝas super la filmoj skematismaj.

La spirita impeto sekvinta la XX-an kongreson de KPdSU aktivigis rapide kaj verve ankaŭ la hungaran filmarton. Ĝi sukcese alproprigis jam la rezultojn de la klasika soveta filmarto, niaj filmistoj talente asimilis nun multe ankaŭ el la vidmaniero kaj atingoj de la itala neorealismo. Depost 1954 la hungara filmo ricevas freŝan elanon, nova generacio de reĝisoroj trovas eblecon disvolvi sian kapablon. Ilia klopodo, atingi la Eŭropan nivelon, implikas la estetikan tendencon: arte respeguli la vivon, la hungaran realon. El tiuj produktoj iĝis vaste konataj i. a. »Karuselo« kaj »Profesoro Hanibalo« de Z. *Fábri,* »Printempo en Budapeŝto« de F. *Máriássy,* komedioj de K. *Makk,* dramoj de L. *Ranódy* kaj Z. *Várkonyi.*

Post la krizo de 1956, kiu provizore haltigis la evulon, venas denove valoraj verkoj: »Kontrabandistoj« de F. *Máriássy* (1958), »La 39-a divizio« de K. *Makk* (1959), »Kvartalo de anĝeloj« de G. *Révész* (1962). Malgraŭ la tiutempe tro multaj filmoj pri klasikaj romanoj, oftaj pseŭdo-psikologiadoj kaj retro-rigardoj al la pasinteco, jam maturiĝis la nova skolo de la hungara filmarto, preparĝis ties plej valora kaj sukcesa periodo.

En la jardeko de 1960 la filmarto forte enradikiĝis en nian nacian kulturon, fundamentis sian propran artan karakteron, kaj aldonis al histo-

rio de la internacia film-arto ĉapitron ekscite specifan, tamen universale ekzemplodonan.

II.

Ĉu troviĝas ia komuna, identa trajto en la ĉefverkoj de tiu periodo, en altvaloraj filmoj de M. *Jancsó*, A. *Kovács*, I. *Gaál*, I. *Szabó* k. a.? Ĉu manifestiĝis nova tendenco, ia aparta hungara skolo — aŭ eventuale aperis nenio alia ol freŝvoĉa sinprezento de novuloj — laŭaĝe eĉ ne nur junaj —, kio per si mem alportas, ke la art-stiloj diverĝas, dispersante ties kolorojn?

Tiuj demandoj prezentas sin ĉe ajna stilo-ŝanĝo, abrupta svingiĝo de la filmarto. Kaj vere, simile kiel ĉe la neorealismo aŭ la „nova ondo", kiel ĉe gravaj ekpaŝoj de la pola, soveta, ĉeha filmartoj — ankaŭ ĉe tiu ĉi elvolviĝo de la hungara filmarto bone rimarkeblas novigaj specialaĵoj koncerne vidmanieron, temojn, esprimilojn. Ĉiuj ĉi, traplektitaj per novaj konceptoj donas nepre unuecan karakteron al la „hungara film-skolo" — eĉ se la artista individueco rezultis larĝan kaj buntan gamon de stilnuancoj: la „kino-verismo" *(cinéma vérité)* de Kovács, la simbol-lingvo kaj paraboloj de Jancsó, historia redokumentado ĉe aliaj, por mencii kelkajn.

Sceno el Szindbád. Dekstre Zoltán Latinovits

Iĝis klara al la hungaraj filmistoj, ke la *„kino de la paĉjo"* — kiel francoj titolis la simple eksplikantan, rakonteman filmadon far la sonĝofabrikoj, eventuale uzantaj tradiciajn dramo-strukturojn — plejparte apartenas jam al la pasinto, eĉ se ĝi ankoraŭ ekzistas. Tiu kino-maniero ĉesis esti la sola por prezenti la realon. Dumtempe firmiĝis la socio, post la milito malaperis la ekstrema mizero, la akraj klaskonfliktoj iĝis pli diskretaj kaj vualitaj; sur tiu modifiĝinta bazo aperis kaj akumuliĝis — ankaŭ ĉe ni — alispecaj situacioj kaj problemoj de la vivo, tute aliaj konfliktoj. Tiujn filmi necesas multe pli elasta, pense-sente nuancebla lingvaĵo, kapabla reflekti etosojn subtile variajn.

Tamen — konsiderante la alispecan socian bazon — tiuj modernaj problemoj kaj situacioj ne estis filme prezenteblaj per la samaj esprimmanieroj, kiujn okcidente kreis la revolucie nova, moderna film-arto — *Fellini, Antonioni*, la „nova ondo" kaj la „kino-verismo". Ilia filma lingvaĵo, esprimilaro naskiĝis el la prema bezono: reflekti adekvate la misan atmosferon de la kapitalisma socio, la forfremdiĝon de la personeco. En la plej diversaj nuancoj disvolviĝis tie la senespera izolecosento, fatalismo, angoro kaj maltrankvilo, kaj trovis ilustradon pere de tiuj novaj film-stiloj. La hungaraj filmistoj staris antaŭ la problemo, kiel estus aplikeblaj tiuj novaĵoj por socialismaj direndoj? Ĉu ebolas helpe de ili projekcii la tute alispecan atmosferon?

Kiel Arkimeda punkto — ĉirkaŭ kiu ellevi la nunan filmarton el la dekadenco, igi kapabla la modernan filmon esprimi nuntempajn socialismajn ideojn — prezentis sin la ekzameno de la *homa respondeco.* Tiun malkovri probable helpis nia ŝtormplena moderna nacia historio, kun dramecaj turnoj kaj fatalaj eraroj, foje tragikaj mispaŝoj. La plej gravaj hungaraj film-verkoj — kun la intenco forte lumigi la veron de la nacia pasinto, same de la hieraŭo kaj nuno — volis plenumi memkritikon kaj mem-ekzamenadon de la nacio. Kaj tio igis ilin specifaj, kvazaŭ memstaraj kolonoj en la internacia film-modernigo: la artan lingvaĵon, kiun kreis okcidentaj filmistoj por majstre *prezenti la forfremdiĝon* — en niaj filmoj oni utiligis *por kontraŭbatali* la forfremdiĝon.

La herooj de tiuj filmoj kolizias ne kun la fremda socio, sed kun propra konscienco, kiu havas ankoraŭ kontaktojn kun la sociaj faktoj. Do ĝuste male kiel la filmoj de la „nova ondo" kiuj prezentas, kiel oni forfremdiĝas de la sorto kaj iĝas ludilo de senindulgaj eksteraj fortoj, senpova kaptito, turmentata de prema malbonfarto mistera por si.

Por la hungaraj reĝisoroj restas ĉefa problemo, kiel siaj herooj rekonas sian homan respondecon, — aŭ se malkapablaj je tio, eventuale rimarkas ĝin tro malfrue — kiel sekvas ilia tragedio. Alivorte: kiamaniere formiĝas socia-humana respondeco el konscio jam fremdiĝinta, sur vojo de rekonsciiĝo.

Por klarigi la sukceson ĉe la internacia publiko „filmklera" — laŭ esprimo de Béla Balázs — ni resumas: tiuj hungaraj filmistoj *konceptis* la plej ĝeneralajn kaj gravajn problemojn de la homaro, kaj samtempe *esploris* ties solvojn. La metodo estis: ekiri el la specifa problemaro de la hungaraj historio kaj vivo al la artnivela ĝeneraligo humana. Estas videbla la modelo de Béla *Bartók*, la komponisto: koneksi la folkloran-nacian karakteron kun la homa universaleco kaj laŭ enhavo, kaj laŭ esprimformo. Pro tio venis la filmistoj *al la problemaroj* de la fiaskintaj hungaraj revolucioj (1848, 1919), de la faŝismo, de la persona kulto, pri rilatoj inter potenco kaj individuo, solidareco kaj respondeco. Sekve de ties severa analizo kaj nova percepto de la nacia historio, disvolviĝis la specifa aspekto de la hungara filmo. Tiel iĝis nia filmarto gravega medio por la socialisma nacia memkono, kaj internacie elstara en la politika filmarto, kiu klopodas per socikritiko alparoli kaj formi la nunan vivon. Vere, pluraj filmoj grave *influis* i. a. la reformojn en la hungara ekonomio (de P. *Bacsó*, *Kovács* k. a.).

Videble, la taskoj estas multfacetaj, do kompreneble elvokas buntan variecon de la esprimmanieroj laŭ la individuoj. El inter la plej konataj reĝisoroj elstaras M. *Jancsó*, kies elokventaj poeziaj paraboloj—simboloj ŝajnas arte la plej gravaj kaj valoraj ankaŭ internacie. I. *Szabó* verkas pli surrealisme, I. *Gaál* kun lirika realeco, F. *Kósa* kaj S. *Sára* laŭ folklora baroko, jam vaste utiligata tra la mondo, A. *Kovács* preferas la dokument-karakteran filmon.

Hungario produktas po 20 filmojn jare; troviĝas do inter ili — kiel ĉiulande — multaj kun mezaj, eĉ malaltaj niveloj. Estis malprogresaj intervaloj, ankaŭ stagnadoj, pri kio ĝuste nun diskutas kritikistoj jam de jaro. Tiaj ondadoj konsistigas la evoluon en ĉiuj artoj: gravaj verkoj alternas kun malpli brilaj periodoj, necesaj por vojserĉado kaj fortikiĝo.

La hungara film-arto dum la lastaj 10—15 jaroj okupis la lokon por si en la nacia kulturo kiel ideojn kreanta kaj peranta medio, egalranga kun la tradiciaj altrespektataj artoj — literaturo, muziko, belartoj; okupis lokon ankaŭ en la film-kulturo kaj historio, kreinte ĉapitron kun novaj, proprecaj aspekto kaj valoro, direndo kaj signaro. Nun estas la tempo por esplori pluajn vojojn, kolekti energiojn. Ŝajnas, ke la hungara filmo jam leviĝas el sia portempa regreso, kaj firme atingos baldaŭ novajn pintojn, plu de la jam atingita supro, por projekcii pli amplekse, el pli larĝa perspektivo la nuntempajn vivon kaj socion.

Tr.: Ervin *Fenyvesi*

Malriĉuloj — reĝisoris Miklós Jancsó

ZOLTÁN ZELK:

BULKO-DANCO EL KINO DE MALNOVAJ TEMPOJ

AL IVÁN MÁNDY

Se sinjoro *Chaplin* volas,
eĉ bulkoj lerte dance rolas —
en Or-manio*, neĝa lando
sola en kaban' sidanto
Chaplin gustumas ŝuojn ronĝe
pro malsateg', sed bulkojn sonĝe
vokas li ordone kun amo
sur la tablon de l' kabano,
kaj bulkoj dancas por ĉiamo!

INFAN-POEMO PRI KINO DE NOVAJ TEMPOJ

AL SÁNDOR SÁRA

El stupo la barbon
havis hom' iama,
li grimpis sur arbon —
feliĉe al loko sama
iris tiam Sára,
ĉe li la maŝin ĉe-mana,
la miraklofara.

Tiel hom' iama
kies barbo fama,
same harar-tuto
estas nura stupo:
grimpas suprenvoje
ne unu, — milfoje,
okazo ne rara;
lin ja fotografis
Sára.

JENŐ HELTAI:

KINO

Ekrano. Mallum'. Stentoraj reklamoj.
Muziko. Kroniko. Kuras la bendo.
Luno. Velkanta bosko. Lag-arĝento.
Orfej' en Novjorko kun mil infanoj.

Chaplin, la vagabondo de l' prudento.
Rajdo. Gangstero. Detektiv' spiona.
Brita floto. Ĉefepiskop' Liona.
Garbo, la reve blonda. Kaj prezento

de muso *Micky*. Kaj tapiŝ' fabela,
kiu sur la senvoja voj' aera
kun pasaĝero flugas al Bagdado.

Larmo. Ridego. *Happy-end:* la fato.
Centimetro el poezio pura,
kaj tri mil metroj el stulto obskura.

Jenő *Heltai:* 1871—1957, poeto, roman- kaj dramverkisto, ĵurnalisto, *Kossuth*-premiito. Kreinto de la hungara vorto: *mozi* — kiu signifas: kino.

*Aŭ: „Oro-febro", Chaplin-filmo pri Alaskaj or-serĉantoj.

Tradukoj de M. *Fejes*



Sekcanto de la historio

Pri la filmoj de Miklós Jancsó

Estas tute certe, ke aŭdante pri la hungara filmo, la plej multaj homoj ekster Hungario pensas pri Miklós *Jancsó*. Inter la hungaraj filmreĝisoroj ĝis nun li rikoltis la plej multajn sukcesojn en eksterlando, tiel ĉe la jugkomisionoj de la internaciaj filmfestivaloj, kiel ĉe la publiko. Rezulte de liaj filmoj la hungara filmarto komencis esti konsiderata kiel atentinda en internacia skalo, kaj lia aŭdaca „filmlingvo" — oni komprenu tiun vorton kiel „perfilma komunikmaniero de arta direndo" — tuj post lia vera debuto en 1965 efikis viglige al la tiutempe anemia hungara filmarto. (La malalta nivelo de la tiutempa hungara filmarto estis tiel evidenta, ke oni eĉ produktis — malbonan — filmon kun la titolo *Kial estas malbonaj la hungaraj filmoj?)*

La filmo *Tiel mi venis,* prezentita en 1965, estis la kvara normallonga arta filmo de Jancsó, tamen ĝi estis la unua, en kiu eblas klare rekoni la postan grandan reĝisoron. Jancsó tiam havis jam kvardek kvar jarojn, do li tute ne apartenis al la juna generacio. Kial nur tiel malfrue li trovis la vojon, kiu ebligis al li krei tute proprecan kaj fortefektan komunikmanerion? Probable la vero kuŝas en tio, ke ĉi tie ne temas nur pri komunikmaniero, pri vere arta bildkonstruo kaj certagrada abstraktigo. Jancsó uzas siajn filmojn por esprimi certan filozofion, kaj por ekspliki ĝin, li uzas kiel modelon la nemultajn ekzistintajn kaj ekzistantajn historiajn mekanismojn. Lia serĉado havas ofte rezulton, kiu por la publiko ŝajnas animskua kaj ŝoka, sed eĉ ŝokitaj personoj ne povas logike kontesti tiujn rezultojn, cetere per sia simpleco kaj klareco memorigantajn pri la senkompromiseco de la klasika marksismo. Mi dubas, ĉu eblus ĉio ĉi por homo pli juna, kiu havas ja nepre malpli da vivspertoj, intelekta sobreco kaj ankaŭ kuraĝo, tre necesaj por tiri konkludojn, kiuj eble ŝokas eĉ la tiranton mem.

La temo de la plej multaj Jancsó-filmoj estas la interrilato inter potenco kaj individuoj, kaj speciale, enkadre de tio, la anatomio de la teroro. Lia sinteno pri ĝi estas tute klara; unu el liaj kritikistoj skribas pri li: „... la filmoj de Jancsó estas pasiaj, kortremigaj protestoj kontraŭ la perforto, despotismo kaj krueleco, kiuj bestigas kaj humiligas la homon."

Liaj plej sukcesaj filmoj estas *Betjaro** (1966), *Internaciistoj* (1967) kaj *Ruĝa Psalmo* (1972). La hungara-soveta koprodukcia filmo *Internaciistoj* — el kies scenario aperas fragmentoj en tiu ĉi numero — temas pri hungaraj militkaptitoj, kiuj post la Oktobra Revolucio aliĝis al la Ruĝa Armeo por batali kontraŭ la blankuloj. La batalo de tiuj homoj fakte apartenas al la plej pozitivaj agoj iam faritaj de hungaroj, ja la blankuloj estis al ili eĉ pli senindulgaj, ol la rusoj, ĉar konsideris ilin fremduloj, kiuj „enmiksiĝis en interrusajn aferojn". (Pro tio la flegistino Elizaveta avertas ilin en la aperanta fragmento ne paroli hungare.) Sed tiuj homoj sciis, ke estas tute indiferente, kie oni batalas por la pli bona mondo, ĉu hejme, ĉu alilande.

El la filmoj de Jancsó estis la *Ruĝa Psalmo,* kiu akiris la plej multajn rekonojn. Inter tiuj la plej grava estis la Premio por Reĝisorado en la Festivalo de *Cannes* (Francio), en la jaro 1972, sed ĝi ricevis premion eĉ en la fora Ĉilio. Estas menciinde, ke Jancsó faris ankaŭ teatran variaĵon de tiu ĉi filmo, kiu temas pri la frutempaj hungaraj agrarsocialismaj movadoj.

En la sukcesoj de Jancsó havas gravan meriton ankaŭ Gyula *Hernádi,* aŭtoro de la scenario de la plimulto de liaj filmoj. Hernádi ne estas nura filmverkisto: oni konsideras lin unu el la plej originalaj figuroj de la nuntempa hungara literaturo. Same multo ŝuldiĝas al la talento de la same preskaŭ konstanta kameraisto, János *Kende.*

Oni ofte riproĉas al Jancsó, ke liaj filmoj tro similas unu la alian. Tiu riproĉo ne estas tute senbaza, sed — kiel unu el la plej kompetentaj pritaksantoj de lia verkaro, Ervin *Gyertyán* konstatas

*betjaro, hung. *betyár,* aŭ *szegénylegény;* fraŭlo rifuĝinta de soldatiĝo aŭ de servutuleco, vivanta foje-foje el rabado (vidu: H. V. 1976/6, paĝo 11, dua kolumno, 25-a linio)

Sciigoj el la hungara filmomondo

Jam ekde unu jaro la hungara filmproduktado okazas inter novaj organizaj kadroj. Dum ĝis tiam funkciis nur du filmstudioj, ekde tiam jam kvar, krome kelkaj por la mallongaj filmoj. Ĉiuj studioj (laŭnome: „Budapest", „Dialoga", „Objektiva" kaj „Hunnia") apartenas al la gvidado de film-entrepreno MAFILM, kaj ili kune produktas jare ĉ. po dudek longajn filmojn. La nova organiza divido ne estas nur formala, sed rezultigas samtempe novan artan-enhavan evoluon. La laboron de la studioestro helpas arta konsilantaro.

Ĝis nun praktike la reĝisoroj ne havis sufiĉe da mono kaj ejo por sinsekve filmi; tial ekde la reorganizo oni klopodas, ke la reĝisoroj povu senĉese labori, kaj tiel gardi la artan-individuan kontinuecon.

La opaj studioj produktos jare po ĉ. kvin filmojn. Inter la pretaj aŭ pretiĝantaj ni mencias kelkajn titolojn: „Epidemio" de Pál *Gábor,* kiu temas pri la 1831-jara ĥoleroepidemio kaj ribelo; „Fantomo en Lubló" de Róbert *Bán,* farita el romano de Kálmán *Mikszáth;* „Naŭ monatoj" de Márta *Mészáros,* „Nigraj diamantoj" de Zoltán *Várkonyi,* el la romano de Mór *Jókai* ktp. Estas menciinde, ke jam ekde jaroj mankas la filmkomedioj kaj filmoj por infanoj.

La novan pritakson de la hungara filmproduktado oni faros dum la prezentadoj kaj diskutoj de la „Budapeŝtaj Filmtagoj", aranĝitaj inter la 10-a kaj 17-a de februaro.

* * *

Zoltán Várkonyi, rektoro de Supera Lernejo pri Teatra kaj Film-arto partoprenis en Meksikio la kongreson kaj asambleon de CILECT, internacia organizaĵo de film- kaj televidartaj superaj lernejoj. La partoprenantoj diskutis, kiel oni povas gardi la naciajn kulturojn kaj batali kontraŭ la kultura koloniigo.

La lernejestroj kunportis ankaŭ filmojn de studentoj; la hungara reprezentanto, Z. Várkonyi prezentis la *„Sinjoro Mundstock",* kiu ankaŭ en *Mannheim* — en la internacia filmosemajno — gajnis premion.

En la kongreso temis ankaŭ pri la nesolvita problemo de filmoŝanĝo: la studentoj ne havas eblon ekkoni la laboraĵojn de siaj kolegoj.

CILECT funkcias perhelpe de UNESKO. Ĝia nova prezidanto estas Manuel *Gonzales Casanova,* fakultatestro pri filmo de Meksikia universitato; Zoltán Várkonyi estis elektita por direktorado.

* * *

En la tuta mondo kreskas la intereso pri la hungaraj televidfilmoj, ĉiam pli kaj pli tiaspecaj produkcioj estas venditaj kaj aĉetitaj.

La „Perfidulo"-n de János *Dömölky* prezentis la hispana kaj okcidentgermana televidoj; la angla kaj la okcidentgermana televidoj aĉetis la filmon „Vintra sporto", farita el romaneto de Sándor *Hunyadi.* En Portugalio kaj en franclingvaj landoj estas prezentata la „Portugala reĝidino" de Károly *Esztergályos,* el noveloj de Tibor *Déry.*

Montriĝas same granda intereso ankaŭ por la muzikaj filmoj, kaj kreskas la eksterlanda famo de la hungaraj porinfanaj televidaj filmoj.

* * *

En *Hollywood* mortis la 83-jara Andor *Zsoldos,* hungardevena film-entreprenisto. Li komencis sian karieron kiel aktoro, poste fariĝis ĵurnalisto, filmverkisto, kaj fondis en Berlino la film-entreprenon „Melodio". Post 1945 li filmigis en Budapeŝto la romanon de Sándor *Bródy,* titolita: „Instruistino" kaj faris la sukcesan filmon „La marŝo de *Rákóczi*".

* * *

La Landa Konsilantaro pri popolklerigado difinis la novajn kadrojn de amatorfilmaj festivaloj kaj renkontiĝoj. Ĝi konstatis, ke lastatempe multobliĝis tiaspecaj festivaloj, sed ili ne okazis en sufiĉe alta nivelo kaj rezultigis nur monperdon. En la estonto oni devas strikte fiksi la datojn de la renkontiĝoj de amatorfilmistoj; la internaciaj festivaloj okazos en ĉiu dua jaro.

* * *

En Lisabono estis prezentita la filmo de Károly *Makk,* titolita: „Amo". Laŭ la kritikisto de *„Diario de Lisboa"* la filmo, farita en 1970, estas „brile elstara artaĵo", kaj ĝia temo „ege instruaĵhava".

Kompilis kaj tradukis:
Zs. Varga-Haszonits

— la fenomeno havas pravigeblan kaŭzon. Nome, la variaĵoj de la historiaj mekanismoj, kiuj estas la ĉefa temo de liaj verkoj, ne estas senfine multaj, kaj eĉ tiuj variaĵoj havas plurajn komunajn trajtojn. El tio sekvas la konsilo, ke oni ne spektu multajn Jancsó-filmojn unu post la alia. Sed tiaĵo ne malotfas en la arto. Sama sin-ripeto kaj certagrada monotoneco senteblas ĉe sinsekva legado de la noveloj de la eminenta argentina verkisto J. L. *Borges,* aŭ, por ĉerpi ekzemplon el la originala Esperanta literaturo, ĉe la legado de la noveloj de S. *Szathmári.*

Tiun fenomenon rimarkis jam ankaŭ la reĝisoro mem, kaj, laŭ freŝaj informoj, lia nova filmo estos komedio. La ŝatantoj de lia arto scivole atendas lian novan „debuton". Tamen, kia ajn ĝi estu, Jancsó per siaj filmoj, produktitaj en Hungario kaj en Italio — li gast-reĝisoris tie plurfoje — estas nepre la plej elstara figuro en la lasta kvaronjarcento de la hungara filmhistorio. Vilmos *Benczik*



András Kovács (dekstre) kun la ĉefrolantoj de Malvarmaj tagoj

András Kovács

Antaŭparolo al la filmo

FALAK (Muroj)

La ĉefaj figuroj de mia nova filmo estas samtempuloj: mia propra generacio, kiu komencis sian karieron post la liberiĝo. Tute juna, ankoraŭ en benkoj de la universitato, mia generacio aktive intermiksiĝis en la sociajn luktojn, kelkfoje en vera senco de la vorto luktis por antaŭenpuŝi la burĝonantan revolucian transformiĝon. Post tiuj ege aktivaj jaroj ni devis travivi plurajn krizajn periodojn, kiuj tuŝis nin pli profunde, ol la generaciojn aŭ pli junajn aŭ pli aĝajn.

Post 1956 oni emis nomi nin „perdita generacio", kiu povos neniam resaniĝi el tiuj animoskuoj. „FALAK" intencas esplori, ĉu tiu generacio vere perdiĝis —, tamen ĝi ekzamenas ne la historion, sed la nuntempan situacion de tiu ĉi generacio, kiu donas grandan parton de la nunaj gvidantoj. Ili do devas entrepreni gravan respondecon pri la aferoj de la nuna vivo, egale, ĉu ili volas tion surpreni aŭ ne.

Kion signifas esti revoluciulo, en tempo kiam la revoluciaj fortoj posedas jam la potencon? Jen la demando, kiu min okupas. Teorie la respondo ŝajnas simpla: apogi la revolucian reĝimon, defendi ĝin se minacata, samtempe kritiki misaĵojn kaj pekojn, eĉ se ili devenas de malforteco aŭ de teoriaj eraroj. Do samtempe esti „simpatianto" al la registaro kaj „opoziciulo". Tio estus banalaĵo, bezonanta nenian klarigon, tamen multaj miskomprenas tion. Mi ofte renkontis ĵurnalistojn kaj kolegojn en kapitalismaj landoj, kiuj ne kapablas alie pensadi ol en akraj kategorioj: aŭ por, aŭ kontraŭ la reĝimo; aŭ subtenanto, aŭ opoziciulo; laŭ tie kutima esprimo: aŭ konformisto, aŭ nekonformisto. Ilia vidmaniero estas komprenebla, ja ili alkutimiĝis al tio, ke tiu kiu estas kontenta, voĉdonas por la registara partio, sed kiu ne kontentas, apogas per sia voĉdono iun opozician partion. Strange, ankaŭ en nia lando meditas iuj similе; sed ĉe ni ekzistas ja unu sola partio, kiu intencas servi interesojn de ĉiuj laborantoj, de iliaj klasoj kaj tavoloj, kaj tion povas plenumi nur en la roloj de la reganta kaj de la opozicia partioj samtempe. Kaj membroj, kaj adeptoj de ĉi tiu partio ne povas utili al la partiaj celoj, nur se ili estas samtempe ankaŭ opoziciuloj.

Kelkajn surpizis, ke FALAK kuraĝis paroli pri tia fakto, ke „muroj" ekzistas en nia vivo, inter ni mem. Nenia nova malkovro, nek malkaŝo troviĝas en tio; ja el aboco de la marksismo sekvas, ke certe ne personaj *deziroj* determinas iun reĝimon: *male,* realaj cirkonstancoj, ekonomiaj kaj sociaj faktoroj ebligas ĝin esti — iĝi tia, kia ĝi estas. Ĉu tiu tezo ne validus ĝuste ĉe ni?

Estas alia demando, ke la muroj kiuj ĉirkaŭas nin, kelkfoje staras pli malproksime ol ni opinias, sed alifoje pli proksime, ol ili devus esti.

Mi ne intencas flankenŝovi la tutan respondecon, ĉar mi konsideras valida la instruojn de la tradicia ĉina ludo, citata en la filmo: pro timo de la muroj, oni ofte ne eluzas eĉ la donitan terenon!

Mi konscie kredas, ke ni havas ankoraŭ multan eblon — ne-utiligitan sufiĉe ĝis nun — sur tereno de tiaj politikaj arto-ĝenroj. Tiujn eblojn eĉ filmoj povas plivastigi, ja la muroj en la socio tute ne estas rigidaj, sed elastaj kaj movigeblaj, do ankaŭ ni povas influi kie ili portempe troviĝas.

Tr. István *László*

Hungaro, kiu kreis la modernan filmindustrion

La historio de la filmfabrikado tiun epiteton donis al la iam mondfama filmfabrikisto, Adolf *Zukor,* kiu ĉisomere mortis en Novjorko, atinginta altan aĝon, 103 jarojn.

Li naskiĝis en malgranda Nordhungaria vilaĝo, lia patro havis tie butikon. La knabo baldaŭ orfiĝis. La ne tro bonkondutan, nek bone lernantan filon la familio sendis al Usono, serĉi tie sian feliĉon. Tie li komencis kiel helpanto en peltvendejo, dume zorge studis la komercajn eblecojn. Venis al li genia ideo: aliĝis al filmkompanio, kie li faris la *unuan* filmon tiel longan, ke ĝi sola sufiĉis por konsistigi programon de kinejo. Ja tiam estis ĝeneralaj la mallongaj, 5—15 minutaj filmoj (kiaj la unuaj burleskoj de *Chaplin*). La publiko estis surprizita, kiam li prezentis sur filmo tutan teatraĵon („Reĝino Elizabeta" kies ĉefrolon ludis la granda franca aktorino, Sarah *Bernhardt*). La konkursantoj unue priridis liajn „eksperimentojn", sed li venkis, lukrante grandajn sumojn. Kreante stabon de famaj aktoroj, li fondis en 1912 filmentreprenon — tiutempe la plej grandan —, kiu iĝis poste la *Paramount* filmfabriko (*Metro-Goldwyn* kaj *Fox*-entreprenoj nur poste estis kreotaj).

Lia vivovojo atingis furorajn altaĵojn: en Usono lia kompanio posedis mil kinejojn, tutmonde ducent agentejojn; lia altega rezidejo en Novjorko, kun luksega kinoteatro, estis siatempe konstrua mirindaĵo. Kiel unua li klopodis krei *artajn filmojn,* kun plena sukceso. Estis li, kiu komencis la kompleksigon en la filmobranĉo: en la sama entrepreno kunigis filmfabrikadon, distribuadon kaj komercadon, krome kinejo-reton.

Eĉ kiel sukcesa „reganto" de la filmindustrio, li ne forgesis sian hungaran patrion: ĉiam fiere rakontis pri sia familio vivinta de pluraj generacioj en Hungarlando, pri la nasko-tero — kaj sin mem konfesis ĉiam hungaro. Vizitante ofte la hejmlandon, la naskiĝlokon, per malavaraj financoj subtenis la kulturan edukadon de siaj iamaj samsortanoj.

P. *Balkányi*

Orfeto — reĝisoris László Ranódy



Sceno el La kvina sigelo

La kvina sigelo

Sendube „La kvina sigelo", reĝisorita far Zoltán *Fábri,* estas unu el la elstaraj hungaraj filmoj prezentitaj dum la lastaj jaroj.

La scenarlibreto estis verkita surbaze de la *samtitola* romano de Ferenc *Sánta,* kies verkojn karakterizas la morala ekkapto de homaj kondutformoj en mikro- kaj makrosocioj, en krizaj historiaj momentoj. Menciinde, ke la renkontiĝo de Ferenc Sánta kaj Zoltán Fábri jam foje rezultigis bonegan filmon: nome, la „Dudek horoj"-n, kiu temis pri la homa flanko de kooperativismo en la 50-aj jaroj, kaj kiu estis tre ŝatata de la publiko.

Sed kun la nomo de Zoltán Fábri kunligiĝas ankaŭ aliaj bonaj filmoj, faritaj pleje el grandaj romanoj („Dolĉa Anna" de Dezső *Kosztolányi,* „Formikejo" de Margit *Kaffka,* „La knaboj de Paŭlo-strato" de Ferenc *Molnár,* „Profesoro Hanibalo" de Ferenc *Móra,* „Bonvenon, sinjoro majoro" de István *Örkény).*

La filmo „La Kvina sigelo" sekvas la romanfluon, sed eĉ tiuj, kiuj jam legis la verkon, sentas, ke ili vidas tute apartan artaĵon, ĉar la filmoj laboras nature per tute aliaj iloj ol la romanoj. Surekrane estas la vizaĝoj, la movoj, kiuj atestas pri karaktero kaj pri internaj psikaj okazaĵoj. Kaj tiuj ĉi-kaze estas ege gravaj faktoroj, ĉar ĝis la duono de la filmo ni partoprenas nur disputadojn de tablosocieto en ia suburba trinkejo. La konversacio de la kvar viroj tuŝas diversajn temojn, jen ĉiutagajn, jen pli seriozajn: la militon, ĉar ni estas en 1944, en la plej malfacilaj tagoj por Hungario. Sed ĉiam pli kaj pli fokusiĝas la ĉefa problemo, kiu pensigas la trinkkamaradojn: la rolo de la simpla homo dum la grandaj, historiaj tempoj. Laŭ ili, la simplulo nenion povas fari kontraŭ la mondo-formantaj potencaj fortoj. Ili opinias, ke nur akomodiĝante al la eksteraj okazintaĵoj, oni povas gardi la homan honoron. Sed neniu povas kaj rajtas ekskludi sin el la komunumo, la sorto de la homoj interrilatiĝas; kaj en la turmentejo de l'faŝismo ili devas elteni la provon de homa honesteco. Kaj la kvar viroj, tute malsamaj laŭkaraktere, la kvar simpluloj, ĉiuj venkas...

La ludo de la aktoroj ankaŭ faras la filmon neforgesebla; ni devas aparte mencii la nomon de Zoltán *Latinovits,* elstara, granda aktoro, kies brila realigo de faŝisma gvidanto estas lia lasta rolo: li mortis antaŭjare en sia 42-a jaro.

— *vhzs* —

Gyula Hernádi — Miklós Jancsó — Georgij Mdivani

Internaciistoj

Fragmentoj el filmscenario

13

Plata, larĝa riverbordo, kovrita per sablo.

Knabinoj, vestitaj per blanka mantelo, kure eniras la riveron kaj eltrenas el la akvo homojn. Rifuĝintajn ruĝulojn.

Sur la bordo kuŝas homoj vunditaj kaj ĝismorte elĉerpitaj.

Inter la vunditoj iradas virino vestita per blanka mantelo. Ŝi havas fortkonturitajn vizaĝtrajtojn: ŝi estas Elizaveta.

Pli malproksime Olga genustaras apud vundito, ŝi palpas lian pulson.

Poste ŝi rektiĝas, aliras alian vunditon kaj ekzamenas ankaŭ lin.

Ŝi diras kvazaŭ nur al si mem:

OLGA: Ili estas ruĝuloj! Oni devas reĵeti ilin.

Elizaveta iras al ŝi. Levas al ŝi la rigardon.

ELIZAVETA: Kion vi diris?

Olga silentas.

Elizaveta ripetas la demandon:

ELIZAVETA: Kion vi diris?

OLGA: Ke ili estas ruĝuloj.

ELIZAVETA: Kaj kion vi diris ankoraŭ?

Ŝi paŝas pli proksimen al Olga.

Olga respondas mallaŭte:

OLGA: Ke oni devus reĵeti ilin.

Elizaveta vangofrapas ŝin kun granda forto, poste turnas sin al la homoj, kuŝantaj sur la tero:

ELIZAVETA: Ĉu iu el vi komprenas la rusan lingvon?

Silento. Poste mallaŭte eksonas voĉo en la hungara lingvo:

HUNGARLINGVA VOĈO: Anoncu vin!

László sidleviĝas kaj ekparolas:

LÁSZLÓ: Mi. Mi parolas la rusan.

Elizaveta klinas sin proksimen al li, kaj montras iom for:

ELIZAVETA: Tiuj estas mortintoj. Skribu la nomojn.

László ne movas sin, Elizaveta rigardas lin.

ELIZAVETA: Bone, ne skribu la nomojn, nur memoru ilin! Pro la parencoj.

Post ioma paŭzo Elizaveta denove ekparolas.

ELIZAVETA: Kiu estas la komandanto?

László daŭre ne respondas.

Elizaveta daŭrigas:

ELIZAVETA: Do, al vi mi diras. Diru al viaj kamaradoj, ke ili silentu, ne parolu en sia gepatra lingvo! Kaj unu afero ankoraŭ: vi ĉiuj estas vunditoj! Ĉiuj vunditoj!

14

Sur la bordo de la rivero staras granda domo, farita el traboj; malantaŭ ĝi staras agrikulturaj konstruaĵoj.

La granda konstruaĵo, iama nobelula domo, estas nun pro neceso milita hospitalo.

Ĉe la angulo de la hospitalo, ne malproksime de unu el la ban-dometoj, staras Olga kaj Elizaveta.

Elizaveta diras al Olga:

ELIZAVETA: Iru ĝis la bordo kaj revenu!

Olga ne tuj obeas, rigardas al Elizaveta en la okulojn, poste turnas sin kaj malsupreniras ĝis la bordo. Kiam ŝi estas revenanta, Elizaveta denove ordonas:

ELIZAVETA: Iru denove!

Olga iras, poste turnas sin kaj revenas. Elizaveta ripetas la ordonon:

ELIZAVETA: Nun iru ankoraŭfoje!

En la malproksimo oni vidas la kurbon de la rivero.

Sur la akvo proksimiĝas boato, tiu de la patrolo de la oficira legio.

Kiam Olga ekiras returnen, la legianoj-oficiroj albordiĝas, kaj malrapide proksimiĝas. Ili haltas, rigardas al Olga kaj Elizaveta, ili ne parolas, nur mute rigardas la du virinojn. Olga iras al la bordo la trian fojon. Revenas. Elizaveta diras al ŝi:

ELIZAVETA: Diru la ĵuron!
Olga ne komprenas.
Elizaveta ripetas.

ELIZAVETA: Diru la ĵuron de Hipokrato!
Olga mallaŭte, en la latina lingvo, komencas reciti la tekston de la ĵuro:

OLGA: Mi ĵuras, ke dum mia tuta vivo...
Elizaveta interrompas ŝin:

ELIZAVETA: Kaj nun diru laŭte, klare, en la rusa lingvo.
Olga komencas malrapide la tekston de la ĵuro:

OLGA: Mi ĵuras, ke dum mia tuta vivo... (ŝi diras la plenan tekston).

ELIZAVETA: Bone.
La ekrano malheliĝas.

19

Ĉe la flanko de la fojnogarbejo staras *Olga* kaj *János.*
Olga firme diras al János:

OLGA: Sidiĝu!
János sidiĝas.
Olga demandas:

OLGA: Ĉu mi senvestigu min?
János ne respondas.
Olga ripetas la demandon.

OLGA: Ĉu vi volas, ke mi senvestiĝu?
János silentas.
Olga diras ankoraŭfoje.

OLGA: Mi volas senvestiĝi.
János ne respondas.
Olga senvestiĝas kaj eksidas apud li. Mallaŭte diras:

OLGA: Demetu la ĉemizon!
János komencas demeti la ĉemizon, sed Olga neatendite kaptas lian brakon kaj ektimante diras:

OLGA: Atendu!
János ne komprenas kaj Olga ripetas:

OLGA: Atendu!
Olga kaŝrigardas malantaŭen, poste returnas sin al János kaj diras obtuze:

OLGA: Kuru!
János stariĝas, ĉirkaŭgvatas kaj ekkuras al la rivero. Eniras en la akvon kaj malaperas post la bordrando.
Olga levas siajn vestojn, prenas ilin, kaj kuras al la rivero. Ŝi banas sin, naĝas.

Sceno el La Internaciistoj

El la direkto de la konstruaĵoj, tra la kampo, aperas la patrolo de la oficira legio. Ili proksimiĝas al la rivero en larĝa segmentvico.
János subakviĝas.
La legianoj alvenas al la bordo.
Ilia komandanto estas juna, nigrahara oficiro, li rigardas Olgan, poste li ekparolas.

JUNA OFICIRO: Bonvolu veni al mi!
Olga eliras el la akvo. Ŝi haltas antaŭ la oficiro. Tiu diras al ŝi nenion, sed daŭre observas la akvon.
La surfaco de la akvo estas senmova.

JUNA OFICIRO: Kiu li estas?
Olga respondas mallaŭte:

OLGA: Mi banis min.

JUNA OFICIRO: Do, vi banis vin.
Li paŝas pli proksimen al la akvo, kaj per sia pistolo plurfoje pafas en ĝin.
La akvosurfaco elsputas etajn gutetojn, sed restas daŭre senmova.
La oficiro turnas sin al Olga:

JUNA OFICIRO: Vestu vin!
Olga prenas siajn vestojn kaj kuras malantaŭen.
La legianoj daŭrigas sian vojon laŭ la bordo kaj ĵetas mangrenadojn en la akvon.
Eksplodoj.
La ekrano malheliĝas.

El la hungara: Vilmos *Benczik*

Mia amato, Elektra

panoramo

Pasintjare, en novembro okazis en francaj urboj *Le Havre* kaj *Reims* hungaraj Kulturaj Semajnoj. Dum la inaŭguro parolis la urbestro de Reims, s-ro *Duromea* kaj la Pariza ambasadoro de Hungario, P. *Veres*. Koncerton de la Hungara Ŝtata Koncertorkestro direktis J. *Ferencsik*, solisto estis D. *Ránki* fortepianisto. Donis koncertojn ankaŭ la folkora ensemblo *„Kolinda"* kaj ciganido-orkestro *Rajkó*. Krome estis prezentitaj hungaraj filmoj, kaj ekspozicioj de folklora arto kaj artaj fotografaĵoj.

* * *

La brita gazetaro sekvas kun vera atento la hungaran muzikarton. Angla ĉabromuzik-orkestro denove interpretis — laŭ Times kaj Guardian — kun grava sukceso la III-an koncerton de A. Szöllősy en Queen Elizabeth Hall. Financial Times detale raportis pri la Muzikaj Semajnoj en Hungario, kiuj povas konkuri kun iu ajn grava muzikfestivalo de Eŭropo, kiel atestas konata muzikkritikisto Dominic Gill. El inter la novaj komponaĵoj aparte ravis lin la pecoj de S. Balassa: „Lupercalia" kaj „Quartetto".

* * *

Ankaŭ junaj tradukistoj partoprenis kaj laŭplezure elektis inter la alilandaj verkoj por traduki ilin en la hungaran, resp. en alian lingvon. Sekvis multaj interkonsentoj pri tradukoj kaj eldonoj.

El La amo, Mari Törőcsik kaj Iván Darvas

Simila intereso estas direktata al la hungara teatra vivo. Longa artikolo de Frank *Lipsius* en *Financial Times* konstatas, ke rapida evoluo rimarkeblas ĉe hungaraj teatroj. Lian atenton altiris historia dramo de E. *Illés: „Izabela,* la hispana"; same la politika kaj religia reliefo en dramo pri *Servet* kaj *Kalvino* (A. *Sütő:* Stelo sur la ŝtiparo). El programo de Nacia Teatro la kritikisto aprecas la dramon de Magda *Szabó:* „Tiu tago, brile bela". La artikolo mencias persone plurajn reĝisorojn kaj eminentajn aktorojn, kaj finas menciante precipe sukcesan modernan dramon: „Filmado surloke" de I. *Csurka.*

* * *

La Asocio de Hungaraj Verkistoj organizis renkonton por junaj verkistoj el socialismaj landoj. La ideo efektiviĝis je ĉies plaĉo, ja oni ekkonis ne nur unu la alian sed ankaŭ la verkojn de aliaj, eĉ la plej freŝe aperintajn.

* * *

En Aŭstralia urbo *Sydney* fondiĝis *Kodály-pedagogia* instituto. Jam funkciis antaŭe pluraj Kodály-societoj dise en tiu kontinento, kiuj de nun kuniĝante, sub komuna gvido klopodos disvastigi la modernajn muzikpedagogiajn metodojn de la fama hungara muzikisto. — Cetere indas mencii, ke en Sydney estis aranĝita granda ekspozicio pri hejmaj instalaĵoj, kiun partoprenis 21 landoj. Inter tiuj la hungaraj entreprenoj prezentis folklorajn kaj hejme produktitajn varojn.

* * *

Antaŭ 30 jaroj, en 1946 fondiĝis en Parizo la Pedagogia Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UNESKO), al kiu baldaŭ ankaŭ Hungario aliĝis. Nun UNESKO havas jam 141 ŝtato-membrojn, kiujn ĝi interligas en la sfero de scienco kaj kulturo. Sub egido de UNESKO ofte kunvenas konferencoj en Hungario; ĉi tie aranĝas UNESKO multajn perfektigajn kursojn pri matematiko, hidraŭliko, agronomio, geologio, biologio k. s. por junaj fakuloj de la evolu-landoj. Dum 15 jaroj UNESKO direktis 70 hungarajn fakulojn por apogi institucionjn en Afrikaj, Aziaj kaj Latin-Amerikaj landoj. S-ro Amadou Mahtar M'Bow, ĝenerala direktoro de UNESKO, dum la laste okazinta ĝenerala konferenco en Najrobo (Kenjo) transdonis oran medalon al dr-ino Magda Jóború, prezidanto de la Hungara UNESKO-komitato, kiu dum du jaroj estis prezidanto de ĝenerala konferenco de UNESKO.

* * *

La libroeldonejo *„Corvina"* solene honoris prof-on Jenő *Barcsay, Kossuth*-premiiton, aŭtoron de furora albumo „Belarta anatomio", ĉar ĝi atingis la 200 milan ekzempleron! Dum 20 jaroj la libro estis eldonita — krom la hungara — en angla, franca, germana, rusa, hispana lingvoj, el kiuj mem la angla eldono vendiĝis en cent mil ekzempleroj.

panoramo

La internacian libro-foiron en Frankfurto partoprenis kvar-mil eldonejoj el 68 landoj, kiuj prezentis ĉ. 280 mil diversajn librojn. La hungaraj eldonejoj ofertis vastan gamon da libroj, kaj sukcesis interkonsenti pri 40 verkoj eldonotaj en fremdaj lingvoj. Eksterlandaj eldonejoj publikigos inter aliaj: poemaron de Attila József en la nederlanda lingvo, romanon de T. Déry: „Kara Bopeer" en la sveda; Gallimard, franca eldonejo aĉetis eldonrajton por libroserio de Gy. Krúdy, en FRG aperos „Historio de mia edzino" de M. Füst, en Danio novelo-antologio; laborista-romano „Makra" de Á. Kertész post ĝia sukcesa germana eldono aperos ankaŭ en lingvoj nederlanda, itala, sveda kaj dana. Fariĝis kontraktoj ankaŭ pri verkoj de filozofo G. Lukács, romanoj de I. Mándy, I. Örkény, Magda Szabó kaj pluraj aliaj.

* * *

En Vaŝingtono la asembleo de Internacia Konsilantaro de Sciencaj Asocioj elektis novan prezidanton, la hungaran prof. Bruno *Straub*. La eksa prezidanto estis prof. Harrison *Brown* el Usono. La Konsilantaro funkcias jam de duonjarcento, kaj kunligas asociojn pri naturscienco el ĉ. 50 landoj. Je honoro de prof. *Straub* la hungara ambasadoro aranĝis oficialan akcepton, kiun partoprenis multaj scienculoj, inter ili la prezidanto de la Scienca Akademio de Usono, Philip *Handler*, H. *Theorell* kaj J. *Kendrew*, ambaŭ *Nobel*-premiitoj.

* * *

La Internacia Prepara Instituto por Ĵurnalistoj, kiu rezidas en Budapeŝto, konstante edukas ĵurnalistojn por la evolu-landoj. Jam pli ol 300 diplomitoj finis la instituton kaj laboras kiel ĵurnalistoj en 37 landoj de tri kontinentoj, i. a. en Ganao, Irako, Nigerio, Tanzanio. La Internacia Asocio de Ĵurnalistoj apogas per stipendio 20 studantojn, sed Aziaj kaj Afrikaj landoj havas bezonon por multe pli.

* * *

Pri la etapturno de hungara arto ĉe komenco de la XX-a jarcento okazis ekspozicio en *Petit Palis* (Malgranda Palaco) en Parizo. La Instituto de Kulturrilatoj, en la kadro de franca—hungara kultura kontrakto, daŭrigas konigi la francan artŝatantan publikon pri la evoluo de hungaraj belartoj. En la ekspozicio estis videblaj pli ol 500 artobjektoj — skulptaĵoj, pentraĵoj, teksaĵoj, mebloj, malnovaj vestaĵoj, afiŝoj, fotoj k. t. p. — kiuj donis sufiĉan konon pri la stilo de tiu epoko. Inter aliaj estas eskpoziciitaj la pentraĵoj de *Csontváry, Csók, Czóbel, Egry, Ferenczy, Gulácsi, Iványi-Grünwald*. En du ĉambregoj de Petit Palais estas lokigitaj la diversaj popolartaj memoraĵoj, inter ili la fama ĉambrodetalo »Matjo« (provinca popolgrupo el la vilaĝo *Mezőkövesd*). Ankaŭ tiu vilaĝo estas mondfama pri la konataj multkoloraj brodaĵoj.

Katludo — Margit Dajka

La gazeto „Neues Deutschland" skribis laŭde pri Berlina koncerto de la ĥoro „Kodály" el Debrecen La ĥoro, gvidata de Gy. Gulyás, prezentis eminente la ne-facilajn komponaĵojn el diversaj epokoj kaj kulturoj; teksto kaj tono sonis laŭ konvinka akordo — finis la kritikisto de la gazeto.

Tr. Szilárd *Bálint*

Ĉiela ŝafido

Literatura metiejo

Pri la poemoj de Judit Estók

Ĉi-foje nian rubrikon ni dediĉas ne al tradukistoj kaj tradukaĵoj, sed al originala poezio; nome, al la poemoj de *debutanta juna poetino, Judit Estók.*

Penetri en literaturon, ĉefe en poezion, kies enhavaj kaj temaj konturoj jam elformiĝis, kies poetikaj (ritmikaj=metraj) leĝoj jam fiksiĝis, ĉiam estas malfacila tasko. Sed same malfacile kaj delikate estas pritaksi la meritojn kaj mankojn de nova poeto, de novaj, uniformaj poempecoj.

Ni ne havas sufiĉe grandan materialon por taksi la poezion de Judit *Estók.* Kelkaj poemoj de iu poeto povas atesti nur pri talento aŭ maltalento, pri serĉataj vojoj. La poemoj de J. Estók estas tiuj de talentulino, sed, nature, ne prilaboritaj, la eblecoj kaj formaj solvoj nur tuŝitaj.

Mi elektis du pecojn ŝiajn: »*Ĉe la rivero*« kaj »*Literoj, homoj*«. Ebe surprizas iun, ke Judit, kvankam poetino, tute ne »kantas« pri la »sentema virina animo«: en »Literoj, homoj« la pripensindaĵon donas la respondeco pri homa aktivado; en »Ĉe la rivero« la impresoj pri naturo adekvatas al pensaj niveloj; la unuvorta prikonsidero de la opaj fenomenoj nin ĉirkaŭantaj konstruas apartan poezian mondon.

Jam dirite, ke *la poemoj de J. Estók estas unikaĵoj, ankaŭ el forma vidpunkto,* ĉar ili konjektigas nur la individuajn formajn solvojn. Ambaŭ estas »liberaj« (v. Parnasa Gvidlibro p. 49.), konstruitaj el plimalpli longaj versoj. Rimoj kaj rimsistemo mankas. Do, restas nur unu afero, kiu povas fari poezion el diverslongaj linioj: kaj tio estas *la plej grava konstruelemento, la ritmo.*

Sen ritmo ne ekzistas poezio. Kaj la poetino ĉi-terene montras la plej evidentan talenton. Kvazaŭ instinkte ŝi eksentas la E-an ritmikon. En »kurbiĝanta dorso de la demando-signoj en la mondo de la »kial«-oj« — la plej bela bildo de la du poemoj — regas sonharmonio kaj kapablo pri pozicisanĝo de akcentoj; aŭ en kelkaj strofoj de »Ĉe la rivero« kapablo pri uzo de amfibrakoj kaj stumbloj (v. P. G. p. 21.). Karakterizaj iloj estas ankaŭ la aliteracio kaj la nuraj inaj rimoj (kun du esceptoj en »Ĉe la rivero«).

Sed la plej grava flanko de la poetino estas, ke *ŝi kapablas percepti* la mondon pere de bildoj.

VHZS

JUDIT ESTÓK

ĈE LA RIVERO

Lumo vibras
tenebro
sube profundo

Vento movas
ve —
brueto- fortiĝo

Ĉielo — akvo — ter'
tenebro super

Ponto — betono
ŝtono — kolono

Era parto
vi — mi verso

Lumo — river'
amo super

LITEROJ, HOMOJ

Nigraj literoj gapas min
per ĝiaj punkto-okuloj,
per ŝvelanta ventro
ridas la »a«-j,
per bastoneto piedoj
magraj formoj stumbladas,
sveltaj zigzaglinioj glitas
sur la vanteco — spegulo,
en maŝo enpremigita
kapoj de la konsonantoj,
la »ko«-j svarmade
antaŭenmarŝas,
fiere la egoistoj, flegmoj,
en si mem turniĝas
la »o«-j rondoj,
kun kompato mansignas
helpantoj, tie strebantaj,
kurbiĝinta dorso de la
demando-signoj en la
mondo de la »kial«-oj —
doubliĝo similulo de ĝemelo,
tenebra punkto-linio ekkrias:
Homoj!

* * *

Apartenas al la plej malŝatataj momentoj de mia vivo, kiam la ĉefredaktoro de HV. transdonas al mi »faskon da nove alsenditaj poemoj«, ja tiuj faskoj ĝenerale antaŭpromesas vesperon ne tre ĝojplenan. Fojefoje tamen ekbrilas en la koto, se ne juvelo, almenaŭ agrable originalforma kaj varie kolora ŝtoneto. Kaj tiaj agrablaj surprizoj ĉiam kompensas por la kotkavado...

La poemoj de Judit Estók estis tiaj trovaĵoj por mi. Agrable freŝa voĉo, kiu nek timas profiti la muzikon de la vortoj, tamen nek perdiĝas en la sonludado; kiu ne forgesas pri tio, ke la vortoj, estas senchavaj aĵoj, tamen ne lasas sin kateni de ili; kiu videble abunde digestis nacilingvan poezion, tamen sukcesis ekkapti iomete ankaŭ el la spirito de Esperanto. Kompreneble nur el tiu de la lingvo, ne de la poezio, sed tio ne estas malmulto. Ŝi senteble ĝojas pro la vortoj, ĝue frandas ilin, kaj el tio sekvas, ke ŝi trovas novan aromon ankaŭ en tiuj, kiuj jam delonge ne ĉarmas konantojn de la Esperanta poezio.

Judit Estók estas sendube talenta persono, kiu *povas* fariĝi bona Esperanta poeto, se ŝi alproprigos la riĉan arsenalon, kreitan de nia originala poezio dum naŭdek jaroj.

V. *Benczik*

KURAS LUMO

Kuras lumo kuras lumo
kial sekvas ruĝa suno
maŝino muĝas maŝino muĝas
rado kuras forruliĝas
inter arboj kaŝvagadas
nur rapidas nur kuregas
vi ne restas ne forlasas
per radioj min plenkovras
rivero kuras akvo kuras
arĝento-strio kien portas
sunradio ruĝa ponto
alarmiĝas vokas bordo
kuras lumo maŝino muĝas
rado kuras forruliĝas
ĝi ne snufas nur kuregas
malaperas ekaperas
ripozu jam sufiĉas haltu
rad' ruliĝas sen vi ankaŭ
vi subite nur kliniĝas
nubo prenas vin plenkovras
sen la lumo vi ripozas
jam ne sekvas ne kredigas
lumo kuras lumo kuras
rado kuras forruliĝas

NEATENDITA

Kiel sur bruna vojo
al migranto: ŝtoneto-rifo

Post laca flegmo la
fala ŝtono de surprizo

Tempo-poluritan glaton
en ondo-sulkon tiras
majstroj-manoj de l' momentoj

Mi levas kun kapturna
raviĝo de l' neatendito

Kaj misteraj ĝojo-sekretoj
de sentoj kunligiĝas...

Muzika konkurso en Budapeŝto

La muzikaj konkursoj de Budapeŝto havas bonan reputacion en la tuta mondo. Ĉi tion pruvas, kiom da partoprenantoj anoncas sin por la konkursoj el ĉiuj kontinentoj.

La tradicio, aranĝi muzikajn konkursojn, estas en Budapeŝto sufiĉe malnova. En la jaro 1933 oni aranĝis la unuan, kaj ekde tiam 14 similaj muzikaj eventoj okazis ĉi tie. La unua muzika konkurso hungara okazis je honoro de Ferenc *Liszt*, mondfama hungara komponisto kaj muzikhistoria giganto de la 19-a jarcento.

Pasintjare la muzika konkurso okazis por honori pianverkojn de du grandaj hungaraj komponistoj: Ferenc *Liszt* kaj Béla *Bartók*.

Certe interesas la leganton, *kiamaniere* okazas la muzikaj konkursoj en Budapeŝto, kiamaniere oni prijuĝas la artan nivelon de tiom multspecaj muzikistoj el la tuta mondo.

Unue: la internacia juĝistaro, kiu plenumis la malfacilan taskon de la prijuĝo, konsistis el 15 mondfamaj hungaraj kaj eksterlandaj pianistoj, kies personeco garantiis la objektivan, neinfluitan funkciadon.

La aranĝantoj — plejparte same pianistoj kaj muzikaj ekspertoj — sciis, ke precipe la junaj muzikartistoj sentas angoron, kiam ili devas ludi antaŭ severa aŭskultantaro, kaj pro tio en la unua etapo ĉiu partoprenanto de la konkurso devis dufoje paŝi sur la podion kaj ludi sian programon.

La partoprenantoj ricevis numerojn laŭ alfabeta ordo de ilia nomo kaj ĉi tiujn numerojn ili havis ĝis la fino de la konkurso. Antaŭ la komenco de la prezentadoj la plej juna pianisto tiris numeron. La artisto havanta tiun numeron estis la unua ludanto, la aliaj sekvis laŭ la kreskantaj numeroj ĝis la lasta. Poste ludis laŭvice de la numero unu — ĝis ĉiu prezentis sian programon. La aĝo de la konkursantoj estis sub 32 jaroj.

Ĉiu etapo de la konkurso estis publika, do la interesuloj povis aŭskulti ĉiun aranĝaĵon de la konkurso.

La aranĝantoj de la konkurso prizorgis por la partoprenantoj loĝejon kaj tagmonon, kaj ebligis ekzerci sur bonaj fortepianoj.

La arta nivelo de la prezentadoj estis klasifikata per numeroj ĝis 25. La respektivaj numeroj aljuĝitaj far la membroj de l' juĝistaro estis adiciitaj kaj la matematikaj averaĝoj prenitaj. Por esti allasata al la sekva etapo, estis necese atingi en la unua etapo almenaŭ 16, en la dua 20 gradojn. La tria etapo estis la lasta.

La ricevitaj monpremioj estis malpli altaj ol en multaj aliaj landoj, tamen multnombra estis la anoncado al la pianokonkurso, ĉar esti premiito en Budapeŝta muzika konkurso signifas por ĉiu koncertagentejo altrangan nivelon de la muzikprezentado.

Povas esti, ke kelkaj muzikaj ekspertoj ne taksas altaj la muzikajn konkursojn entute. Estas ja vere, ke ekzistas mondfamaj muzikistoj, kiuj ne gajnus premion en muzika konkurso kaj aliaj, kiuj gajnis premion, povas esti malpli altrangaj artistoj; ĉi tio dependas ne nur de muzika talento, sed de psikologiaj kaj aliaj personaj cirkonstancoj. Sed tute certe estas, ke la aŭskultantaro, precipe la muzik-studentoj multege gajnis per aŭskultado de la diversaj prezentadoj.

Estas inde mencii, per kiuj pianoverkoj konkursis la kandidatoj. En la unua etapo estis devige ludi unu el la tri fiksitaj »*Francaj suitoj*« de *J. S. Bach* kaj la »*Pianosuiton*« *de Bartók*. Kelkaj el la artistoj sufiĉe akcepteble prezentis la verkon de *Bartók*, sed mi mem eĉ unu prezentadon de la verko de Bach ne aŭdis, kiun mi povis taksi altvalora. Eĉ la prezentado de la Pianosuito de Bartók plejparte ne respondis al la intenco de la komponisto. Bartók mem ludis siajn verkojn pli »*rubato*«* ol multaj junaj pianistoj, kiuj preferas prezenti la kompoziciojn de Bartók en pli meĥanika, pli motora maniero.

En la meza etapo la pianistoj ludis unu el 6 difinitaj sonatoj de *Beethoven* kaj unu el ses verkoj de *Bartók* kaj krom ili unu el preskribitaj hungaraj modernaj muzikverkoj.

La finala etapo konsistis el la prezentado de la *Sonato en h-minoro de Liszt* kaj unu el la pianokonĉertoj de Liszt aŭ Bartók. Interese, ke la plejmulto de la kandidatoj preparis sin prezenti la *Konĉerton en Es-maĵoro de Liszt.*

La nomoj de la gajnintoj montras, el kiuj diversaj landoj venis la junaj pianistoj al Budapeŝto por konkursi.

La unuan premion gajnis Robert *Benz* (Germana Fed. Resp.); la duan ricevis du pianistoj, Frédéric *Augessy* (Francio) kaj Gary *Steigerwalt* (Usono). Ankaŭ la tria premio estis dividita inter Vadim *Monastirskij* (Sovetunio) kaj Imre *Rohmann* (Hungario). La kvaran premion ricevis ankaŭ du artistoj: Boris *Guslicer* (Sovetunio) kaj Imai *Akira* (Japanio). Kálmán *Drávfy* (Hungario) kaj Andreas *Pistorius* (Germana Dem. Resp.) atingis la eksterordinarajn premiojn de la Konsilantaro de Budapeŝto.

La Budapeŝta konkurso profundigis la ĝis nun atingitan bonan reputacion de la ĉi-tieaj muzikaj aranĝaĵoj. La muzikamantoj kaj interesuloj de la tuta mondo kun scivolo atendas la sekvajn hungarajn aranĝaĵojn. Sendube ili ne trompiĝos.

Lajos *Lesznai*

**rubato:* en individua, libera tempo kaj ritmo.

Interparolo kun profesoro Mihály Simai

La lingvo-problemo laŭ la prezidanto de Monda Ligo de UNO-Asocioj

En marto de 1976 la Monda Ligo de UNO-Asocioj elektis prezidanto profesoron Mihály Simai, ĝen. sekretarion de la Hungarlanda UNO-Asocio. Tiaj asocioj jam troviĝas en 86 landoj kun la celo, apogi la strebadojn de UNO flanke de la socio, tiel akceli internacian kooperadon, lukti por senarmigo, kontraŭ novaj militoj. Helpi al la evoluantaj landoj estas aparte grava klopodo de la Ligo, i. a. sendante ekspertojn al ili. Krom gravaj personoj kunagas ankaŭ asocioj: ankaŭ Hungara Esperanto—Asocio estas tia „kolektiva" membro de la landa UNO-Asocio.

HV petis intervjuon de prof. Simai, kiu cetere estas vicdirektoro de la hungara Esplor-instituto pri Mondekonomio.

Raportisto: Kiaj estas la rilatoj inter la Unuiĝintaj Nacioj kaj la Monda Ligo de UNO-Asocioj?

Prof. M. Simai: La Ligo estas konsiderata kiel t. n. A=kategoria organizaĵo en la plej gravaj institucioj (Unesko, k. a.) de UNO. Tio rajtigas la ligon partopreni en ĉia ajn debato, eĉ organizi konsultadojn mem en UNO, krome uzi ties vastajn eblecojn. Multflankaj, bonaj interrilatoj kun la aparato kaj organoj de UNO, ofte senperaj kontaktoj kun la ĝen. sekretario kaj aliaj altranguloj de UNO, helpas nian funkciadon. Aliflanke UNO reprezentas sin en regionaj aŭ aliaj gravaj konferencoj de nia ligo. Sekve la ligo havas eblecojn por influi en UNO, almenaŭ tiom, kiom neinterregistara organizaĵo povas havi.

R: Kion vi spertis pri lingvaj problemoj de UNO kaj en la internaciaj rilatoj?

S: Tio estas vere grava afero, cetere ŝajne nur UNO sukcesis solvi la grandan problemon, interkonsiliĝi tute senĝene pere de bonaj interpretistoj. La sinkron-interpretado ĉe UNO estas nun tute elstara, kaj pro ĝia tekniko, kaj pro siaj bonegaj ekspertoj. Tamen ekster la oficialaj konferencoj tiu situacio estas jam multe pli malfacila, ĉar dum diskutoj oni uzas ĉefe la anglan lingvon, kiun multaj delegitoj ne aŭ ne bone parolas. Tamen, laŭ mia impreso, dimplomatoj oficantaj ĉe UNO scipovas la anglan aŭ la francan, per kiuj jam eblas konvene labori. En la aparato de UNO ĉiuj ses oficialaj laborlingvoj estus teorie uzeblaj, tamen praktike la angla estas la uzata lingvo. En UNO ofte kaŭzas lingvaj aferoj disputojn, eĉ ofendiĝojn, malgraŭ la eminente funkciantaj interpretistaj kaj tradukistaj servoj. En malgranda rondo ofte ne funkcias interpretado, kaj venas la problemo, kiu lingvo estu uzata? Mi mem ĉeestis kunsidon, kies preezidanto (el Azia lando) proponis uzi sole la anglan, kion diplomato el Afriko kontraŭis. Li insistis uzi ankaŭ la francan, sed la plimulto decidis uzi nur la anglan. Tiam li — por protesti — diris siajn alparolojn ruslingve.

R: Tamen la lingvosituacion en UNO karakterizas la fakto, ke tie oficialaj estas la privilegiitaj lingvoj de kelkaj grandpotencoj — gepatraj lingvoj de kelkaj delegitoj; por granda plimulto tiuj estas nur lernitaj lingvoj! Dum konferencoj kaj diskutoj ili nepre sentas sin en situacio malavantaĝa, kaj psike, kaj spirite — kompare al la rajtigitoj uzi sian gepatran lingvon. Same okazas ankaŭ ekster UNO en ĉiu internacia konferenco.

S: Tute certe, okazas tiel. Kaj tio kreas verajn malfacilaĵojn por reprezentantoj de landoj kies lingvo estas eĉ ne parenca al iu oficiala lingvo. Ili bezonas longan tempon, devas venki multajn malfacilaĵojn ĝis ili jam kapablos senĝene labori, akirinte la konvenan lingvoscion.

R: Inter la oficistaro de UNO fondiĝis E-grupo por ekzameni la eblecojn por uzo de Esperanto en UNO. Eĉ el inter la eminentaj interpretistoj kelkaj ekkonis, ke en internacia medio *nur internacia lingvo* povas krei vere egalajn spiritajn kondiĉojn por la traktado.

S: Ankaŭ mi aŭdis pri tiu grupo; eĉ pri tio, ke pluraj novaj membro-ŝtatoj jam pledis por ia solvo de komuna lingvo. Sed tiu problemo estas ege malfacila! Ankaŭ tial, ĉar pasos longa tempo ĝis ĉiu ajn en tiel granda internacia organizaĵo atingos konvenan nivelon en la akceptota komuna lingvo. Estas necese tiucele atingi interkonsenton, konvencion, tio mem ne estus simpla afero. En internacia organizaĵo prezentas sin amase problemoj, malfacile solveblaj. Evidentas, ke se tio sukcesos, la tuta laboro de UNO ege malkomplikiĝus.

R: La lingvo-problemo koncernas ne nur UNO-n, sed ĉiun landon kaj popolon; ĉu troviĝus ebleco, ke la Monda Ligo de UNO-Asocioj esploru vaste la lingvoproblemon de internaciaj rilatoj pere de komisiono de lingvo-ekspertoj? Tiu komisiono konsistanta el scienculoj, kiuj konas ankaŭ la Internacian Lingvon, prilaborus ankaŭ rekomendon por la solvo. Cetere, tian komisionon krei proponis al Unesko jam en 1965 la svedaj parlamento kaj registaro; pledis por ĝi pluraj lingvistoj, inter ili Mario *Pei*, profesoro de Universitato Columbia, skribinta pri tio en libro *„The Story of Language"* (Historio de la lingvo). Ĉu la Ligo eventuale prenus tiun iniciaton por apogi ĝin ĝisfine?

S: Ŝajnas al mi, ke tio estus *vere interesa kaj taŭga propono,* kiu nepre meritas nian atenton. La pledantoj de tiu problemaro devus trovi rimedon, prezenti tiun proponon al la plenumkomitato de nia Ligo, ĝi havas ja rajton pritrakti tiajn temojn. Povas proponi tion ekzemple iu internacia organizaĵo ...

R: ... eventuale Universala Esperanto-Asocio?

S: Jes, tiukaze la plenumkomitato metus ĝin sur tagordon. Se la prezidanto de UEA ekzemple turnus sin al mi, aŭ rekte al la ĝen. sekretario de nia Ligo en Ĝenevo, li, eventuale mi devos prezenti la aferon al la plenumkomitato; la rezultato dependos de la komitata decido. Cetere la 15 membroj de la komitato reprezentas ne landojn, sed la 15 regionojn de la mondo.

R: Se HEA prezentos tiun proponon al vi, do al la plenumkomitato, ĉu ĝi havos vian simpation kaj apogon?

S: Miaflanke nepre! Evidente! Tamen, antaŭvidi kiel decidus la plenumkomitato, nun mi ne povas. Sed laŭ mia kono, troviĝas kelkaj esperantistoj en tiu komitato, kaj ili aktivas en via movado.

R: Tio esperigas. Probable tiu komitato havos komprenemon pri problemaro de la multlingveco en nia mondo kaj racie decidos fondi tiucele *internacian lingvisto-komisionon;* ties sciencistoj preparos, laŭ profundaj esploroj, bone fundamentitan *raporton kaj la rekomendojn* de tiu aŭtoritata komisiono — ĉu la Ligo havos rimedon prezenti tiujn rezultatojn al UNO, por prepari konvencion pri aprobo de internacia lingvo?

S: Laŭ mi, nia monda ligo havos eblecon turni sin kaj transdoni tiun raporton al la ĝen. sekretario de UNO; la ĝen. sekretario rajtas prezenti poste la aferon al la ĝenerala kunsido de UNO.

R: Vi mem kiel konsideras la ideon kaj perspektivon de internacia lingvo?

S: Ankaŭ mi komencis lerni Esperanton iam, sed pro tempomanko mi devis ĉesigi tion. La ideo de unueca internacia lingvo daŭre interesas min; mi opinias tute ne malreala klopodo, ke estu akceptota tia lingvo, peranta inter naciaj lingvoj por plibonigi interkomunikadojn. Tamen tio bezonas maturiĝon de kondiĉoj, do tute ne simpla afero, ĝuste vi, aktivuloj de la movado, scias tion pli bone ol mi. Pripensu. ke mem la lernado de fremda lingvo kaj ties organizado estas malfacila ĉie ajn. Ŝajnas precipe malfacile por tiuj, kiuj devus rezigni en intereso de internacia lingvo pri vasta internacia uzado de sia gepatra lingvo, pri ties avantaĝoj — kvankam ĉi lingvon parolas eble jam kelkcent milionoj da homoj.

R: Tiuj nacioj konsistigas apenaŭ kvaronon de la homaro — kalkulante ankaŭ la fremdulojn, kiuj iomete lernis ilian lingvon. Filoj de ega plimulto de la homaro devas barakti por alproprigi iomete la privilegiitajn „mondlingvojn" de kelkaj grandpotencoj — por prosperi en internaciaj rilatoj. Malgraŭ perdo de tiaspecaj avantaĝoj, la popoloj kun privilegiitaj lingvoj certe baldaŭ rekonos la universalajn utilojn de peranta lingvo, ĉie uzata laŭ UNO-konvencio.

S: Prave, ĝuste tial mi studis kun granda intereso la uz-eblecojn de Esperanto. Tamen, oni ne forgesu priatenti la realaĵojn de la mondo. Oni devus i. a. devige instrui Esperanton en ĉiuj lernejoj, sekve necesas formi taŭgan instruistaron, — tio kondiĉas grandajn elspezojn. Mi konscias, ke Esperanto estas la lingvo plej facile kaj rapide lernebla, sed ĉu por ĉiu ajn? Ĉu tiel facila ankaŭ por orient-azianoj, por afrikanoj, kun lingvoj tiom diferencaj de la latina bazo? Estus inde bone esplori tion. Do la premisoj de la tuta afero ŝajnas profunde kaj zorge ekzamenindaj.

R: Jam vaste estis demonstrita de japanaj, ĉinaj, vjetnamaj intelektuloj, ke ankaŭ por azianoj, same por afrikanoj Esperanto estas multe pli facile kaj rapide lernebla fremdlingvo, ol la lingvoj de la iamaj koloniaj potencoj. Kio koncernas la bezonatajn instruistojn, — ilia aro estas multe pli malkare kaj facile edukebla, ol la kuna mondvasta formado de fremdlingvo-instruistoj —, krome bonvolu aldoni la egajn kostojn kaj la suferojn de la lernantaro! Ĉiu lingvoinstruisto estas per si mem taŭga por transpreni dum kelkaj monatoj la instruadon de Esperanto, surbaze de sia erudicio kaj rutino, sed precipe pro ĝia klara sistemo! Glata kaj ne multekosta estos tiu evoluo, dum kiu la pedagogiaj institutoj vaste povos fundamenti la edukadon de la novaj E-instruistoj.

Imre Szenes kaj Mihály Simai

S: Probable, la estonta lingvisto-komisiono — se fondiĝos — esplorante la solvon, proponos tiucele ligi tutmondan konvencion, kio faciligos multon. Ĉu tio sukcesos en nia jarcento, ĉu en la venonta? Estus grave ekspliki la menciitajn problemojn kaj kun granda zorgo alveni al rezulto.

La argumentoj, kiujn mi nun aŭdis, ŝajnas vere pripensindaj, kaj same estis tre interesaj la ideoj kaj faktoj. Tiuj devos igi primediti ŝtatajn kaj internaciajn forumojn, kiuj foje okupiĝos pri tiu problemaro. Se ĝi antaŭenigus kooperadon, alproksimiĝon de la popoloj, solvadon de la grandaj problemoj de l'homaro, estos certe necese okupiĝi serioze pri afero de la Internacia Lingvo.

R: Koran dankon s-ro prof. Mihály Simai pro la dialogo.

Imre Szenes

Tr.: Mária Rózsa Szabó

62-a Universala Kongreso de Esperanto

Rejkjaviko (Islando) 1977 07 30-08 06

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam—3002, Nederlando. Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Pósthólf 1081, Reykjavik.

Sed pliaj elstaras personoj el la Islanda publika vivo aliĝis al la ok aliaj jam anoncitaj membroj de la Honora Komitato por la 62-a UK. Ili estas: Birgir Isleifur Gunnarsson, urbestro de Rejkjaviko; Gudlaugur Thorvaldson, rektoro de la Universitato de Islando; Bjőrn Jónsson, prezidanto de la Ligo de la Laboristaj Sindikatoj; d-ro Thorsteinn Thorsteinsson, eksestro de la Statistika Oficejo, pioniro de Esperanto en Islando; Andri Ísaksson, sekretario de la Unesko-komisiono en Islando; Sigurdur A. Magnússon, prezidanto de la Verkista Asocio de Islando.

Bertram Potts

LA NOVA INSTRUISTO

En la klasĉambro estis multe da bruo kaj ĝuo, dum la knaboj sendiscipline atendis la alvenon de sia nova instruisto. Ili devis ne longe atendi.

Kiam la pordo malfermiĝis, silento regis tuj kaj ĉiu lernejano stariĝis rigide, — modelo de atento kaj bona konduto.

Antaŭe marŝis la lernejestro; sekvis lin nekonata viro, certe la nova instruisto.

„Sidiĝu, knaboj! Rekte! Bone! Hodiaŭ mi havas gravan devon, kiu certe estas grava por ĉiu el vi. Vi venas ĉi tien, por lerni kaj estas mia devo, kiel lernejestro de ĉi tiu lernejo certigi kaj certiĝi, ke ĉiu el vi lernas kiel eble plej multe. Estas pli facile akiri scion en la tagoj de via knabeco, ol poste, kiam vi frontos la mondon ekstere, kiam vi devos dediĉi vian tempon al pandona metio kaj al la multaj ĉagrenoj kaj zorgoj, kiuj sendube sieĝos vin."

Li paŭzis.

„*Annandale!* Pardonu, se mi vekas vin, sed rigardu min, dum mi parolas kaj estu atenta! Hodiaŭ, knaboj, ne estas okazo, kiam mi devas fari paroladon, por kuraĝigi vin kaj instigi vin al edukaj celoj. Tion mi rezervas por specialaj eventoj en la historio de nia lernejo, kiam viaj gepatroj kutime ĉeestas. La proverbo diras, ke por ĉiu faro estas horo, sed hodiaŭ ne estas la horo, por ekzerci parolkapablon. Tio ne estas mia celo. Tempo ne abundas por ekstertemaj aferoj. Do, al la afero, mi prezentas al vi sinjoron *Handle*, kiu estas ne nur sperta instruisto kaj viro kun vasta erudicio, sed bone konata sur la kampo de nia literaturo. Mi scias certe, ke vi ĉiuj lernos el lia instruado. Mi esperas, ke jes—ke ĉiu el vi bone aplikos sian individuan kapablon al la lecionoj, kiujn sinjoro Handle prezentos. Mi lasos lin kun vi."

Dum lia teda enkonduko la knaboj fikse okulmezuris la novevenintonton.

Kia diferenco! Ilia antaŭa instruisto estis iom grasa kaj alta, dum sinjoro Handle estis kontraŭe tute ne dika kaj ne multe pli alta ol la plej alta knabo en la klaso. Fama verkisto, eble, sed kia seniluziiĝo!

Sed, en la semajnoj, kiuj sekvis, ili ĉiuj lernis admiri kaj respekti lin pro lia penema deziro adekvate ekipi ilin, por alpaŝi la konkurencan mondon ekstere. Ili trovis pli da intereso en aritmetiko, historio, kaj geografio, ĉar li povis instrui pacience kaj distre. Li estis majstro de retoriko kaj posedis riĉsonoran voĉon kun distingiga tembro, tiel ke la anglalingva leciono speciale impresis la klason kaj atentokapte tenis ilin.

„Rilate literaturan stilon mi povas doni al vi nur simplajn kaj praktikajn ekzemplojn, por gvidi vin," li diris, sed vere li faris pli ol tion. „Ne estas reguloj, kiujn mi povis citi, por kultivi individuan stilon. Eĉ se vi ne volas superi ĉi-konekse, ja ne estas necese, ke vi enskribiĝu en la vicon de verkistoj, por ĝui kaj rekoni bonan verkadon."

Estas neeble scii, kiom el ili profitis de lia peno tiucele, sed ili trovis tiun lecionon multe pli plaĉa ol la komplikaĵojn de sintakso, kiujn ili devis lerni en tiu periodo. Sinjoro Handle certe montris pli interesan alpaŝon al la fenomenoj de gramatiko.

Li prezentis elĉerpaĵojn el famaj aŭtoroj kaj kuraĝigis la knabojn legi iliajn librojn kaj verki klare kaj elegante.

Iun tagon sinjoro Handle volis, ke liaj lernantoj proponu temon por eksperimenta komponado kaj post iom da diskuto inter si, la klasanoj elektis la temon *Nokto*. Li petis, ke ili laŭtvoku kelkajn fonajn karakterizaĵojn, por reliefigi la scenon, kiujn li listigos sur la nigra tabulo.

Jen la detaloj:

La luno brilas.
Estas steloj. Nuboj.
Blovas venteto.
Apude estas ruino kaj arboj.
Iom fore vilaĝo.
Noktomezo.

„Bone! Vi jam disponigis sufiĉe por skeĉi simplan noktan scenon. La tasko por verkisto estas prezenti tiun bildon sur la bazo de via fono. Mi provos doni al vi ekzemplon. Kopiu ĝin, dum mi skribas."

Li revokule rigardis la nigran tabulon kaj studis la vortojn provizitajn de la klaso, antaŭ ol levi la kreton.

Ĉi tie, apud la malnova ruino, estis malvarme kaj mallume. Sur mia vango la milda vento kise metis sian kareson, antaŭ ol esplore malaperi en la nigron de la arboj. Trans la kampo, kie nestis la dormanta vilaĝo, la lumigita vizaĝo de la preĝeja turo radiis la noktomezan horon. Mi rigardis supren tra la brankoj de la malnova kverko al la triumfa arko de la Lakta Vojo, kiun parte kovris taŭzitaj nuboj, tra kies labirinto la luno velis en majesto. La steloj lace palpebrumis, dum la planedoj brilis kiel diamantoj sur baldakeno el nigra veluro. Malproksime la silueto de la montoj kaŭris kiel la dorso de giganta prahistoria besto. La tuto estis spektakle grandioza.

„Tio estas nokta sceno, kiun mi provis pentri kun iom da literatura koloro. Ĝi revizie bezonas iom da pritondado."

La klaso multe admiris la skribaĵon, eble pro tio, ke ĝi mem provizis la konsistigajn elementojn.

„Ni provu denove. Pri kio la temo?"

Bill *Hodgeham* kriis:

„Sunsubiro!"

Sinjoro Handle sin turnis al la nigra tabulo, viŝis ĝin, kaj skribis laŭ la dikto de la klaso:

Sunsubiro.
Nuboj.
Vento blovas.
Ĉiam pli laŭte.
Nuboj ŝanĝas sian formon.
Ombroj.
Belaj koloroj.

Li laŭte kaj malrapide tralegis la vortojn dufoje, antaŭ ol demandi:

„De kiu punkto ni rigardu la scenon? Ĉu ni staru en urbo, vilaĝo? Ĉu sur ŝipo? Aŭtoro devas scii la precizan lokon."

Tassel rekomendis:

„Sur pacifika insulo!"

Sinjoro Handle aldonis la tri vortojn al la listo, petis, ke la klaso kopiu kiel antaŭe, kaj komencis verki. Li faris tri-kvar korektaĵojn, antaŭ ol retropaŝi kaj laŭtlegi sian komponaĵon. La vortoj kaskadis muzike de liaj lipoj.

Kiom mi ĝuis la sorĉitan scenon en tiu pacifika sunkuŝiĝo. La okcidenta ĉielo de horizonto al zenito flamis per longaj karmezinaj langoj, kiuj de tempo al tempo fariĝis ĵetitaj lancoj el ora lumo. Neniam antaŭe mi vidis tiom da fandiĝantaj nuancoj en skalo tiel spirorabe vasta. Malalte sur la ĉielo la skulptitaj nuboj, kiel kasteloj, kalejdoskope ŝanĝiĝis ĉiumomente al turoj kaj bastionoj el ora fajro. Sed alte, kiel la volbon ornamis ruĝaj nubetoj, kiel plumoj de fenikoptero flosantaj en la vento, grandioza mantelo el skarlato sterniĝis en la fono kun la delikato de burĝonanta hibisko. Sur la surfaco de la laguno ombroj de la nuboj glitis minace kaj malaperis en la nigron de la klifoj. En la komenco la zefiro, kiu krispigis la akvon kiel sulkojn el oro, rapide kaj sovaĝe laŭtiĝis kaj transpasis la kokospalmojn, kiel la klavojn de granda orgeno.

„Kion vi pensas pri tio?"

„Tio sonas tre elokvente," iom time opiniis Forman, kaj rideto ludis sur la vizaĝo de Sinjoro Handle, kiam li diris:

„Mi ne volas aŭdi pri la oratora efekto. Tio estas arto kiu povas trompi vin. Kion vi opinias pri tio kiel beletra peco?"

La tuta klaso opiniis ĝin bona kaj tion esprimis entuziasme.

„Se oni legas flugrapide, eble tiu verketo ŝajnas posedi literaturan kvaliton, sed vere ĝi ne estas fundamente bona. Mi kredas, ke neniu redaktoro akceptus ĝin — almenaŭ neniu, kiu scias uzi sian forstrekan krajonon. Eble la frazoj individue havas iom da merito, sed en la maso, la peco estas tro belsona, tro ornama, tro sukereca, por ne diri naŭziga. Legu ĝin du aŭ tri fojojn kaj informu min, kion vi rimarkas."

Monotipio de Oszkár Papp: La migranta instruisto

Alfson, la plej lerta knabo, kuraĝis paroli unua.

„Mi rimarkas, sinjoro, ke la langoj en la unua frazo fariĝas lancoj en la sama frazo."

„Bone, Alfson. Vi troviĝas sur la ĝusta vojo. Se ni malmuntos la frazojn je vortoj, ni trovos en la teksto tro da vortfiguroj. Sur la nigra tabulo troviĝas ses frazoj, en kiuj rimarkebliĝas langoj, ĵetitaj lancoj, fandiĝantaj nuancoj, skulptitaj irizaj nuboj, kasteloj, turoj kaj bastionoj, ora fajro, plumoj de fenikoptero, grandioza mantelo, burĝonanta hibisko, sulkoj el oro, kaj klavoj de granda orgeno. Tio estas eksterordinara katalogo en kelkaj linioj. Eble vi nun surpriziĝas, ke vi antaŭe tion ne rimarkis, ĉar iom da poezia brilo blindigis vin."

„Eble ĝi similas al edziĝa kuko kun multe da sukera dekoracio," asertis Trotters klarbilde.

„Precize. Do, memoru, kiam vi verkas, ke vi evitu tro pompajn aludojn, ke vi ne tro garnu viajn priskribojn."

„Neniu espero por tio, sinjoro! Mi intencas fariĝi plumbisto!" klarigis *Stoneford*. „Sed plaĉas al mi legi bonajn frazojn."

La sekvantan semajnon sinjoro Handle komencis la anglalingvan lecionon, petante temon por simila eksperimento.

„Pri la sama temo kiel antaŭe, sinjoro," sugestis Alfson. „Plaĉus al mi vidi alternativan prezentaĵon pri stela nokto je koralinsulo—luno, vento, mevoj kaj tiel plu."

„Ĉu ĉiuj el vi konsentas?"

Ĉar neniu kontraŭis, li petis denove, ke oni faru kopion. Li ankoraŭfoje pripensis kelkajn momentojn kaj rapide skribis. Li silente tralegis la pecon, antaŭ ol sin turni.

„Mi ne mistifikos vin ĉi tiun fojon," li ridetis. „Vi rimarkos, ke mi muntis la scenon ne tiel lukse kiel antaŭe."

Jen lia verko, kiun li imprese rakontis kun sia kutima fervoro.

Estis neforgesebla nokto de stelluma kaj tropika sereno. En la malproksimo la surfaco de la oceano estis simfonio de tremanta arĝento, sed ĉe la rifo la ondoj ruliĝis el la mallumo kun brilpunktoj de fosforeska ŝaŭmo. Tute neatendite la saltanta surfo tondre frakasiĝis kontraŭ la rokojn de la rifo, batante la kremecan linion en tempesta inundo, kiu ritme daŭris la tutan nokton. Kaj super la ventopelita

F/330

ŝpruco la mevoj ŝvebis senorde en la lunlumo, senĉese vekriantaj en la vento. Sed, de la strando, kie mi troviĝis, la kolero de la pli fora maro sonis kiel la bruo de solena tamburado; kaj tiel ravite mi staris, ke mi subite saltis, kiam nerimarkite la ondetoj alkuris kaj petoleme karesis miajn maleolojn.

„Tralegu ĝin kelkajn fojojn, kiam vi havos tempon, kaj komparu ĝin kun la alia ekzemplo. Ĝi ne tiel hirtiĝas per ornamaj esprimoj, sed necesas tamen iom da rafinado. Verku hejme, se vi volas, komponaĵon pri simila sceno kaj alportu ĝin al la lernejo. Vi trovos, ke ekzistas granda fendo inter teorio kaj praktiko."

Li tre volis helpi la klason. Ho ve, neniu liveris ion por lia kritikado, ŝajne trovante la fendon tro profunda.

Iom poste li prezentis alian frazon.

„Kiam aŭtoro verkas rakonton, ĉu romanon, ĉu novelon, li volas, ke vi havu mensan bildon de la persono, kiun li prezentas. Li priskribas, ni diru, viron.

Eble kelkaj vortoj taŭgas."

Sur la nigra tabulo li rapide skribis:

Li estis alta kaj belfigura malgraŭ lia mezaĝo—viro kun intensa determino.

„Jen estas dek-duo da vortoj, sed sufiĉe, eble, en novelo, por stimuli la imagon kaj kontentigi leganton. Mi volas, ke vi verku du frazojn pri viro, kiun la tuta klaso konas—lokan butikiston, ekzemple, la lernejo-prizorganton, aŭ..."

„...la lernejestron!" — spritis *Ramblin.*

„Bone! Vi ĉiuj konas la lernejestron: nur du frazojn, sufiĉe por novelo. Ni nomu lin sinjoro *Krajono.* Mi donos al vi sep minutojn!"

La plej lertaj tuj aktiviĝis kaj ŝajne ne spertis ĝenon, facile karakterizante la lernejestron, dum aliaj rigardas la paperon animforeste aŭ kontentiĝis per unu-du vortoj.

Poste ili laŭtlegis siajn frazojn laŭvice, kiuj iufoje okazigis multe da ridado. Kelkajn li skribis sur la nigra tabulo por posta komentado, jene:

En sia ĉambro sinjoro Krajono sidas la tutan tagon kaj faras nenion. Lia malbela vizaĝo timigas ĉiun.

Sinjoro Krajono ne havas lipharojn, ĉar li estas plene razita. Li portas malnovan kompleton.

Antaŭ ĉirkaŭ kvindek jaroj naskiĝis maljuna sinjoro Krajono. Li havas ordinaran vizaĝon, du elstarajn orelojn, kaj du metrojn da alto.

Sinjoro Krajono havas kalvan kapon kaj sarkasman voĉon. Li ĝojplene turmentas etajn knabojn.

Sinjoro Krajono estas maljuna kun vizaĝo kiel juglando. Longaj haroj kreskas el lia nazo.

Sed antaŭ ol la instruisto povis komenci sian komentadon, la pordo malfermiĝis kaj la lernejestro venis en la ĉambron. Okazis flustrita konversacio inter la du viroj kaj sinjoro Handle eliris el la ĉambro.

La lernejestro ne perdis tempon.

„Dum via instruisto atentas alian aferon, mi prizorgos la klason. Estas la anglalingva leciono, ĉu ne?"

Li rigardis scivole al la nigra tabulo. Aŭdiĝis ridadeto, ĉe kio li rapide turniĝis.

„Silenton! Nur en teatro vi povas stulte blekridi. Vi estas ĉi tie, por absorbi scion, por evoluigi komprenadon, por ke vi ekipu vin por la vivo. Blekridado ne rekomendos vin kiel lertan kaj fidindan metiiston aŭ profesiulon. Azenoj rajtas bleki, ĉar ili estas azenoj. Do, mi ne volas aŭdi pli da stulta bruado. Mi bezonas profundan atenton. Pri kio temas la leciono sur la tabulo—por ke mi daŭrigu?"

Neniu kuraĝis paroli kaj kelkaj sekundoj pasis, antaŭ ol la lernejestro fiksis la okulojn al Ramblin.

„Vi! Kion vi lernas el ĉi tiuj frazoj—ĉu vortanalizo, ĉu frazanalizo?"

Ramblin stariĝis sur tremantaj kruroj kaj liaj manoj prenis firman tenon sur la skribotablo.

„Ili estas nur frazoj, sinjoro!"

„Frazoj? Kompreneble ili estas frazoj! Ili ne aspektas kiel tabelo da bataloj aŭ aritmetika problemo! Kion mi volas scii estas, ĉu la klaso gramatike analizas la frazojn: subjekto, predikato kaj tiel plu—aŭ ĉu vi faras vortanalizon: substantivo, verbo, konjunkcio kaj tiel plu? Kion vi precize lernas?"

„Sinjoro Handle parolas al ni pri literatura stilo, sinjoro, daŭrigis Ramblin."

La lernejestro direktis sian atenton al la nigra tabulo.

„Estas nenio klasika en ĉi tiuj frazoj pri la ne tre admirinda sinjoro Krajono," li sciigis. „Ĉu ĉi tiuj frazoj supozeble posedas literaturan kvaliton?"

Ramblin sciis, ke li ne povas klarigi, ke ili temas pri la lernejestro mem, do, li malfermis sian kajeron kaj etendis ĝin al li, menciante:

„Estas aliaj ekzemploj ĉi tie, sinjoro."

„Dankon, Ramblin. Sidiĝu!"

La lernejestro flugrigardis kelkajn paĝojn kaj komencis legi laŭte la kondamnitan pecon, kiu komenciĝis:

Kiom mi ĝuis la sorĉitan scenon en tiu pacifika sunkuŝiĝo. La okcidenta ĉielo de horizonto al zenito flamis per longaj karmezinaj langoj, kiuj de tempo al tempo fariĝis ĵetitaj lancoj el ora lumo.

Leginte la tuton, li rimarkis:

„Tio estas certe citaĵo el la angla literaturo! Vi! Jes, vi, vi kun la ruĝaj haroj, atentu! Kion *vi* opinias pri tiu peco?"

La okuloj de la klaso turniĝis al la malbonŝanca knabo. Estis *Gordon,* iom timema knabo. Tamen, li kuraĝe frontis la frostan rigardon de la lernejestro.

„Ĝia konstruo ne estas bona, sinjoro! Ĝi ne havas literaturan valoron!"

„Kion! Ne havas literaturan valoron! Ridinde. Ĉu vi estas reenkarniĝo de William *Shakespeare* aŭ nur perfekta ekzemplo de vilaĝa idioteco? Kial tiu peco ne havas literaturan valoron?"

„Ĉar ĝi estas tro ornama, sinjoro. Ĝi estas preskaŭ katalogo da objektoj—kasteloj, hibisko, fenikoptero, lanĉoj kaj multaj aliaj!"

La lernejestro okulboris la knabon kun surprizo. Li rektigis sin kiel ekkrian signon de severa kritiko, kaj lia voĉo akiris raspan kvaliton.

„Vi senrezerve kvalifikiĝas kiel premiita stultulo, Gordon. Eble vi moŝtos ĵeti iom da lumo sur ĉi tiun alian stultulon sur la nigra tabulo, kiu rigardas el la fenestro kaj faras nenion la tutan tagon. Bonvolu sciigi al viaj kunklasanoj, kiu parolelemento estas la unua vorto en la unua frazo kaj kiamaniere ĝi rilatiĝas al la aliaj vortoj en la frazo!"

Peza ŝarĝo falis sur la koron de ĉiu knabo, kaj la klasanoj tre ĝojis, kiam sinjoro Handle revenis en la ĉambron kaj savis ilin.

Kiel eksterlandanoj povas aliĝi al la Esperanto-fako de la Budapeŝta Universitato?

La redakcio de Hungara Vivo daŭre ricevas leterojn, en kiuj interesemaj legantoj petas informojn pri aliĝo al la Esperanto-fako de la Budapeŝta Universitato „Eötvös Loránd". Ĉar ĉiujn opajn leterojn ni ne kapablas respondi, ni ĉi-sube donas ĝeneralajn indikojn pri la temo.

La Esperanto-fako funkcias kiel suplementa fako, do oni devas elekti ankaŭ alia(j)n fako(j)n prefere ĉe la Filologia Fakultato, — ekz. historion, la hungaran lingvon kaj literaturon, alian lingvon, bibliotekadon, popolklerigon, filozofion ktp.

Sed antaŭ ĉio eksterlandanoj devas partopreni unujaran antaŭpreparon pri la hungara lingvo en Budapeŝto, kiun gvidas la Internacia Antaŭprepariga Instituto (Nemzetközi Előkészítő Intézet, Budapest XI., Budaörsi út 73/75. Poŝtadreso: H—1502 Budapest, Pf. 60.). Ties kondiĉo estas havi stipendion de la propra ŝtato (germanoj de la germana, poloj de la pola, ktp.).

Post unujara antaŭpreparo la studonto devas fari ekzamenon pri la hungara lingvo, poste akcepto-ekzamenon ĉe la universitato pri preskribitaj studobjektoj, depende de la elektitaj fakoj.

Se la kandidato estas akceptita, komenciĝos la kvinjara studado. En la dua jaro de la studoj oni povas aliĝi al la E-fako. La unuan jaron daŭras lingva antaŭpreparo por komencantoj. Kiuj ne bezonas tion, tiuj povas aliĝi al la E-o fako en la tria studjaro; do oni studas E-on entute 3 jarojn: literaturon, gramatikon, interlingvistikon kaj metodikon. Oni finas la E-o fakon samtempe kun la aliaj fakoj.

Do, resume la paŝojn, laŭvice:

1. peti kaj havi stipendion de la propra ŝtato; 2. aliĝi al la unujara lingva antaŭpreparo en Budapest; 3. fari ekzamenon pri hungara lingvo; 4. fari akcepto-ekzamenon ĉe la universitato (Eötvös Loránd Tudományegyetem Bölcsészettudományi Kara, H—1364 Budapest, Pf. 107.); 5. en la dua, resp. tria jaro aliĝi al la E-o fako, kies gvidanto estas dr. István Szerdahelyi.

ANDRÁS SIMOR

PAROLU POR ILI!

(Variantoj por poemo de César Vallejo)

I.

Sinmurdantoj saltas kapantaŭe en la riverojn.
Ĉu mi menciadu la aŭdacan arkon de la pontoj?

Iu surstrate terenbatis Paul Robeson.
Ĉu mi laŭdu al Metropolitan de Novjorko?

Oni infektas la teron de malsataj kampuloj.
Ĉu mi gapadu pri ilia scienco medicina?

Oni senharigas negran dudekjarulinon.
Ĉu mi plezuriĝu je ĉijara Miss America?

Oni montradas en rezervejoj la humilan indianon.
Ĉu mi traktu kun ili pri la futuro de la homaro?

Oni konsideras kiel milita celpunkto la leprohospitalon Quynh Lap.
Ĉu mi diskutu pri la komunaj interesoj de la kulturo?

Kun aldorsita piedo dormas pario.
Ĉu mi parolu estante tiel al iu ajn pri Picasso?

John Steinbeck en uniformo enhelikopteriĝas.
Ĉu mi eble verku disertaĵon pri liaj estintaj meritoj?

Oni parolas pri paco apud la pendigilo.
Ĉu mi konferencu pri paco, sen armilo enmane?

II.

Venas homo, lia murmura stomak' muzikas.
Se li konus Beethoven, komprenus lian koleron.

Vundito rigardas la eliĝintajn intestojn.
Se li scius pri Puŝkin, nomus lin propra poeto.

Alligito strečas la korpon.
Li pensus pri Lorca, sed neniam aŭdis tian nomon.

Aliu — fuĝas en mondon foran.
Se li konus Arthur Rimbaud, ŝatus lin.

Ĉi tiu estos nuken pafita.
Li ne scias: li modeliĝis por Derkovits.

Knabeto pentradas per ŝupasto.
Li neniam aŭdis la nomon de Siqueiros.

La mizer' forportis Áron József.
Li ne legis versaĵojn de la filo.

Parolu por ili, kiuj eĉ panon ne havas.
Ili iam bezonos eĉ poemojn.

1957

Tr.: Zoltán *Gabányi*

Medioprotektado — monda problemo

Verkis d-ro FERENC LÁSZLÓ,
ĉefsekciestro de OHV*

II.

Aerpolucio

La grandmezura teknika evoluo, krome la rapidtakta urbanizado kunportis la nocan konsekvencon, ke ankaŭ la alia grava elemento de la natura medio: la aero venis en danĝeran situacion. La ĉefaj aerpoluantoj estas: la industrio, la trafiko kaj la hejmohejtado. La mezuro de polucio en konkreta kazo estas proporcia al la ĉeestanta kvanto de tiuj faktoroj. Kiom maltrankviliga estas la aera polucio, ni menciu la situacion en Usono laŭ artikolo aperinta en *International Herald Tribune* (1970. 04. 27.) Laŭ tiu la fontoj de aerpolucio en Usono en 1965. estis la sekvaj:

Poluciofontoj	Milionoj da tunoj	Aerpolucio en %
Aŭtoveturiloj	86	60
Industrio	23	17
Elektro-centraloj	20	14
Hejtado	8	6
Manipulado de balaaĵoj	5	3
Suma aerpolucio	142	100

Oni povas konstati, ke 60% de aerpolucio devenas de aŭtoveturiloj. Tio estas la situacio en Usono, sed kia estas en la tuta mondo? Konsiderante ĉiujn landojn de la Tero laŭ la statistikaj indikoj, en 1966 estis funkciigataj 179,3 milionoj da aŭtoveturiloj. Taksante la poluaĵokvanton, produktitan de unu aŭto jare po 1 q, estas videble kiom grandmezura estas tutmonde la polucio, kaŭzita de aŭtoveturiloj, despli ĉar ilia nombro konstante plimultiĝas.

Tiuj faktoj prezentis urĝan bezonon por oficialaj disponoj, kaj ekonomiaj, kaj teknikaj, kiuj kontribuos al forigo de tiuj malbonoj.

La prosperon de disponoj por ŝirmi la aero-purecon helpas, ke pluraj teknikaj metodoj celantaj plian energio-ekonomion, samtempe malpliigas polucion. Tiaj estas i.a. hejt-instalaĵoj bruligantaj pli bone la brulmaterialojn, pli altaj fum-turoj ks. Por energio-ŝparado oni komencis tutmonde instituci la reguligon de karburatoroj en aŭtoj kaj eksplodmotoroj, same malpliigante la en-aeriĝon de nocaj brulrestajoj.

Male, la ŝirmadon de la aera pureco malfaciligas, ke la troan polucion de urbaj medioj kaŭzas ĉefe malpli grandaj polucio-fontoj. Ties moderigo, kaj teknike, kaj ekonomie, estas malpli favora, ol ĉe la granduzinoj, kiuj — precipe la termo-energiaj centraloj — trovas lokon jam pli malproksime de la urbaj „fumkupoloj".

Sekve, montriĝas tre multekosta, longedaŭra kaj malfacila tasko atingi tian nivelon de aerpureco, kiu kontentigus en ĉiu rilato la medio-biologiajn postulojn. Kiom ajn multaj estas la malhelpaĵoj, tamen la homaro devas venki ilin laŭgrade, ĉar ĝia propra ekzisto estas danĝerigita.

Grundopolucio

En la biologia ciklo havas tre gravan rolon la grundo, kies signifon ĉiam pli kaj pli emfazas la fakto, ke nia Tero devas nutri kaj provizi loĝantaron salte multiĝantan. Iam, ĉirkaŭ 7000 jarojn a. K. vivis nur 10 milionoj da homoj sur la Tero el biologia ciklo de faŭno kaj flaŭro. En la unua jc p. K. vivis jam 160 milionoj; en 1700 p. K. jam 600 milionoj; en 1950 jam 2500, kaj en 1975 la nombro de homaro atingis la 4000 milionojn.

Konsiderante la produktivan grundon baza faktoro de la agrokulturo, resp. de la nutraĵprodukado, oni povas konstati, kiel grava tasko estas konservi, eĉ pliigi la kvanton kaj produktivecon de la grundo.

La specifaj medioprotektadaj taskoj koncerne la grundoŝirmadon signifas pli, ol nur certigi la kamparan kaj arbaran produktadojn. Granda parto de la grundo servas por loĝlokoj, industrio, trafiko, refreŝiĝo kaj aliaj utilaj celoj. Troviĝas tamen grundoj neniel uzataj, eĉ nocaj al nia medio. Multobliĝas artefaritaj „grundoj" eraoj por skorio kaj neuzeblaj elfosaĵoj, por rubaĵoj de loĝlokoj kaj uzinoj. Krom poluciaj efikoj, tiuj malbonigas la estetikan valoron de la naturo, simile al la surfacaj minejoj, kiuj pro loko de la materialoj, ofte okupas tre produktivan kamparon, kaj same det-

**OVH: Országos Vízügyi Hivatal (Hungarlanda Hidrologia Instituto)*

Parto el la Granda parko de Debrecen

ruas la pejzaĝon. Feliĉe, hodiaŭ jam pli kaj pli ofte okazas la rekulturigo: oni rekovras la terenon per humo kaj denove kultivas post fino de la eksploatado. Tamen restas ofte post la materialo-elfosado detruitaj la terenoj, neutiligeblaj kaj estetike malfavoraj. Utiligi tiujn denove, konvene al la ĉirkaŭaĵo, estas grava tasko.

Tre gravajn mediajn efikojn kreas polucio de prikonstruitaj terenoj. Unu el ties fontoj: la difektiĝintaj, likantaj kloako-kanaloj de fabrikoj kaj domoj, kiuj enigas en la grundon, resp. en la grundakvon, multajn bakteriojn per la fekaĵoj, kaj venenojn per la kemiaĵoj. Putoj povas infektiĝi, dom-fundamentoj difektiĝi, kondukiloj disiĝi, ktp. Simila estas la situacio pro la hejmaj kaj industriaj defalaĵoj, balaaĵoj, kiujn oni ne izolite deponis, kaj pro la el-aeraj polucioj, kiuj penetras en la grundon, ĉefe per la precipitaĵoj. La kemiaj kaj mikrobiologiaj polucioj detruas la vegetaĵon ĉu en la loĝataj, ĉu en la kultivataj areoj.

Grandegan zorgon kaŭzas en nia tempo la kemizado de agrokulturo pro la grundo- kaj akvo-polucioj. Sekvas ne nur lokaj grundo-difektoj, ĉar la kemiaĵoj atingas la animalojn de la akvoj, faras ne-uzebla la akvon de la irigaciaj kanaloj, ofte ankaŭ la trovejojn de la trinkakvo. Jam tutmonda problemo iĝis, ke la kemiaĵoj, uzataj en la agrokulturo — pere de plurŝtupa t.n. nutraĵo-ĉeno atingas ne-eviteble la homon. Sufiĉas aludi pri DDT kaj ĝiaj parencoj, ĉe kiuj nur post plurjara amasa uzado estis malkovritaj la riskoj de nerekta danĝero. En la nutraĵo-ĉeno la grundo ordinare iĝas unua peranto inter la uzita kemiaĵo kaj la homo.

Troviĝas ankaŭ tia kazo, kiam la grundo estas la dua aŭ la plua ĉenero en tiu vico. Jen ekzemplo la brulgasoj de la aŭtoj, funkciigataj per superbenzino, enhavas *plumbo-tetraetilon,* kiu poluas unue la aeron, kaj de tie ĝi demetiĝas sur la apudvojan grundon. De sur la surfaco ĝi eniĝas en la plantaĵojn kaj tiel plu. Ĉiuj ĉi faktoj montras, ke ankaŭ la defendado kontraŭ la grund-polucioj estas tasko ekstreme kompleksa, do farenda kun grandega respondeco.



Uzino de VITUKI, en Szappanosszék

Nocoj pro bruo

Kune kun la kreskanta disvastiĝo de maŝinoj kaj urbanizado, la bruo-nocoj ankaŭ kaŭzas pliiĝantan zorgon tutmonde unuavice en uzinoj, ĉe konstruadoj, aviadiloj, kaj pro la aŭto-trafiko kun pleja intenseco meze de la grandurboj, ĉe la trafik-nodoj de la loĝregionoj.

Laŭ la ĝenerala opinio, nur bruoj de ekstreme granda intenseco kaŭzas damaĝojn de aŭd-senso. Malpli konataj, sed multe pli ĝenerale efikas la bruoj, kiuj ĝenas grandan parton de la loĝantaro dum laboro, ripozo, distriĝo — jen rimarkeble, jen ne. Oni ja alkutimiĝas al la bruoj (kvankam tiuj ankaŭ tiukaze ne perdas sian efikon), kio igas pli malfacila sin defendi kontraŭ tiuj. Kvankam pro la rimarkeblaj bruoj unue oni iĝas incitema, laciĝema, malatentema (danĝero de akcidento!), sed la noca efiko de la akumuliĝantaj, ne-rimarkitaj bruoj influas la nervosistemon, senpere malsanigante ĝin, aŭ pere de la nervoj nocas aliajn organojn. Tio ne dependas simple de la bruo-intenseco. La sonoj de ŝanĝiĝanta alteco kaj alterna intenseco, aŭ ĉe sama sonado *abrupte* rompantaj fortaj sonoj efikas *pli grave*, ol la daŭre laŭta, sed konstanta bruado.

Krom malsanoj, kaŭzitaj de bruo, ties ĝenerala kresko jam alportas ne-neglekteblajn ekonomiajn damaĝojn. En Svedio ekzemple estis demonstrite, ke la bruo kaŭzis 10—13%-jn de labortagoj perditaj pro laborejaj akcidentoj. Estas klare, ke necesas efikaj disponoj por malpliigi, resp. elimini la bruonocojn, despli ĉar en multaj landoj estas ankoraŭ tro modestaj tiurilate la rezultoj.

* * *

Post skiza priskribo de la plej minacaj mediaj nocoj, ni rigardu la situon de la medio-protektado en Hungario. Antaŭ ol mi komencus konigi la medioprotektadajn laborojn, okazintajn en la nunaj kaj nelonge pasintaj tempoj, estas menciinde, ke en nia lando tio havas signifajn tradiciojn. Hungaraj inĝenieroj (unuavice hidro- kaj forst-inĝenieroj) instigitaj de spertoj pri la noca procezo dum la 150-jara turka okupado, kun kreskanta rezulto kontraŭbatalis la sekvojn de la grundo-ruiniĝo, de la erozio: *forst-inĝenieroj* per reforstigo, — *kultur-inĝenieroj* ĉe erozioj kaŭzitaj pro akvofluoj, per fiksigo de sablejoj kaj forstigo de kalvejoj, —

agrokulturaj inĝenieroj kaj grund-biologoj per deklivo-firmigo kaj per rekreado de la engrunda vivo.

Kvankam internacie estas relative nova problemaro la certigo de bonkvalita akvo, tamen la hungara jura reguligo por ŝirmi la purecon de akvoj povas rerigardi je pr. 130-jara pasinteco. La 1840-jara X. leĝo pri la akvoj kaj kanaloj, minacas per mon- kaj aresto-punoj tiujn, kiuj estis malpurigontaj akvojn, riverojn, kanalojn per defalaĵoj-malpuraĵoj, tero, sterko, aŭ per kanabo-ruado. La leĝo XIV. el j. 1876 pri la publika sanitaro, jam rajtigas la publikajn instancojn — eĉ uzante devigon — forigi ĉion, kio poluas grundon aŭ akvojn. — La jura reguligo preskribis kiel taskon observi, ĉu la tiutempe fonditaj uzinoj efikas noce je la publika sanitaro. Post unu jardeko la leĝo XXIII. el j. 1885 malpermesis la infektadon de akvoj per nocaj materialoj, — sed en intereso de la akvouzado kaj de la industrio, lasis al la instancoj prijuĝi, ĉu la poluakvoj estas enlaseblaj en la vivajn akvojn.

Transirante al la problemoj de l'hodiaŭo ni povas konstati ĝojiga fakto, ke en nia lando la medi-protektantaj disponadoj far la registaro okazis de tiu tempo, kiam la situacio ankoraŭ ne fariĝis katastrofa. Tion ni mencias tial, ĉar en kelkaj landoj, — kiuj estas pli evoluintaj ol la nia en rilato de la industrio kaj urbanizado — nur tiam oni komencis okupiĝi intense pri la medioprotektado, kiam jam pro la polucioj el kelkaj riveroj ekstermiĝis ĉiuspeca vivo, la aerpolucio postulis centojn da homaj vivoj, kaj aperis specialaj mediaj nocoj estigantaj malsanojn.

En Hungario la situacio ankoraŭ ne iĝis tiom maltrankviliga, sed la tendencoj jam alvokis la atenton por fari efikajn disponojn, elimini la jam spertitajn mediopoluciojn, kaj ĉefe, anticipi la pli gravajn malbonojn.

La enlanda industri-evoluado, la kresko de la energieksploatado kaj la urbanizado ankaŭ ĉe ni influas la kvaliton de la surtera akvoprovizo. Nia

Riveret- ŝveliga digo ĉe Csesztreg



Por la puro de riveroj

La rivereto Szinva en Miskolc

surtera akvoprovizo devenas el akvokolekta teritorio de pluraj najbarlandoj, kaj signifa parto de tiuj akvoj venas jam poluita tra la landlimoj en nian landon.

Krom diversaj polucioj de industria origino, lastatempe la polucio devenanta el la kemiizado de la agrokulturo ankaŭ ĉe ni malbonigas la biologian ordon kaj uzeblecon de naturaj lagoj, akvorezervujoj kaj de kelkaj akvofluoj. Kreskas ankaŭ la polucio devenanta de sintezaj purigiloj kaj laviloj, kiujn ellasas la priservaj industrioj kaj la mastrumadoj.

Parto de nia surtera akvoprovizo — kiel supre mi menciis — apartenas al la t.n. iomete poluita kategorio. Preskaŭ sola escepto estas la lago Balatono, kaj inter niaj riveroj la supra etapo de Tiso (Tibisko) kaj la okcidenta Danuba flankrivero *Rába* pro siaj — ankoraŭ — puraj akvoj.

Al la poluita kategorio apartenas la riverego Danubo. Ĝia poluiteco malfaciligas la trinkakvoprovizadon de Budapeŝto kaj de la aliaj Apud-danubaj loĝteritorioj, krome tio igas pli multekosta la utiligon de la riverakvo.

Kun la polucio de aero kaj akvo estas nedisigeble kunligita la polucio de grundo. Malpuriĝas la grundo per la atmosferaj kondensaĵoj, krome pro la rapide kreskanta kvanto de la defalaĵoj devenantaj el la kemiizado de produktado, de agrokulturo kaj el diversaj vivfunkcioj de la loĝteritorioj. En niaj urboj estas takseblaj jare po du milionoj kubaj metroj da domaj malpuraĵoj, la bruligo de la defalaĵoj, kies utiligo en la energiocentraloj estas ankoraŭ ne solvita sen nocaj efikoj por la medio ĉirkaŭaĵa. Tio kaŭzas ne sole en čefurbo, sed ankaŭ en iu ajn metropolo de la mondo gravajn zorgojn, ĉefe pro la impeta grandiĝo de la kvanto de ne diseriĝantaj plasto-defalaĵoj.

Rimarkinda estas la erozio de agrokulturaj teritorioj. Granda parto de la montaraj kaj montetaj teritorioj de la lando iĝis jam kalva tereno pro la jam en la pasinta tempo senplana arbarekonomio. La sedimentoj kunportitaj per akvo desur deklivoj iom post iom plenigas la fluejon de riveroj, malpliigante ties kapaciton, kio donas grandajn problemojn okaze de inundoj. Plurmilionaj kubaj metroj da sedimento kovras la plugkampojn ĉe piedoj de deklivoj kaj ege nocas la agrokultivadon.

Rapide progresis la urbanizado, precipe en la ĉefurbo, kio forte kreskigis gravecon de la industriaj nocoj, resp. la ŝirmadon kontraŭ ili. La aeropolucio far la veturiloj, la bruonocoj, la stres-efikoj de metropolo naskas seriozajn perturbojn. Ĉio kiune danĝerigas sanon de la čefurba loĝantaro kaj belecon de ties ĉirkaŭaĵo.

Ĉi tio indikas, ke la medio-polucio en Hungario iĝis vera danĝerfonto pro la impetaj industria progreso kaj urbanizado de la lastaj du-tri jardekoj. Por venki tiujn danĝerojn necesas diversaj disponoj, ankaŭ juraj.

La registraro ordonis jam en 1954, ke „industria entrepreno, uzino kaj ankaŭ tia entrepreno aŭ institucio, kiu mem ne servas por industria produktado, sed dum sia funkciado estiĝas polucia akvo — noca laŭ vidpunktoj de publika sanitaro kaj de popolekonomio —, ne povas esti planata, konstruebla kaj funkciigebla sen polu-akvon puriga instalaĵo." Tiun registaran decidon sekvis poste nombraj disponoj.

Ni ellevu el inter niaj disponoj pri medio-protektado la dekretojn rilatajn kun la ŝirmado de agrokulturaj regionoj, arbaroj, sovaĝbestoj, pri konstruado, sanitaro, kaj tiujn pri aero-pureco. La leĝo pri medio-protektado, akceptita de la Parlamento en marto 1976, paŝis plu antaŭen, ĉar ĝi preskribis la fundamentajn celojn de la protektado koncerne *ĉiujn faktorojn de la medio;* ne unuope, sed ĝi metas la *tutan komplekson* de la homa medio sub juran protekton! Tio estas tre grava nova konsidero.

La leĝo akcentas, ke la taskoj de la medio-ŝirmado estas solvendaj paralele kun la intensa ekonomia evoluo, kiel ties organika, parto.

Teknikaj, ekonomikaj magistrataj disponoj rezultis, ke en nia patrio ekiris favora procezo en kelkaj sferoj, por forigi, resp. malgrandigi mediajn nocojn. Estas jam akvo-fluoj kaj lagoj, kie — pro purigo de polu-akvoj — montriĝas ĝojigaj signoj de regenerado, kiel ekzemple en la *Danubo-branĉo* de Ráckeve (sude de Bp.), en rivereto *Szinva* (ĉe Miskolc), en lago *Tatai-tó* (Transdanubio).

La protektadon de aero-pureco komencis sisteme en 1976 la ĉefurba konsilio, kiu finance subtenas modifon de utiligo de energi-portantoj, aplikojn de instalaĵoj por polvo-forigo, translokigon el la ĉefurbo de kelkaj tre poluantaj uzinoj, kaj etendas vaste la distanc- kaj blok-hejtadon.

Dank' al tiuj disponoj, la sulfurpolucio de la Budapeŝta aero en 1975 meznivele jam ne atingis eĉ la duonon de la 1969-jara indekso. Gravas, ke nia industrio produktis en la lastaj du jaroj instalaĵojn kaj mezurinstrumentojn por aerpurigo kaj polvo-forigo, krome modernajn hejt-aparatojn, en valoro de pr. unu miliardo de forintoj.

Konstateble evoluis en la urboj la nivelo de la urbopurigaj servoj, kaj la parkizado de la publikaj placoj. Ĉesis malkreski la arbaroj, eĉ komencis jam vastiĝi la forstigitaj terenoj. Kaj en la ĉefurbo, kaj en aliaj grandaj urboj sukcesas la ŝirmo-celaj forstizadoj, kiuj revokas la urbanojn al la naturo, al seren-etosaj parkoj, al arbaraj gimnastikejoj, por ripozi kaj ekskursi.



La Balatono ĉe Tihany

Rezultoj modestaj, tamen laŭ tendenco favoraj. Por solvi problemojn de nia naturprotektado, la registaraj instancoj kun granda atento orientiĝas al la internacia kunlaboro, kies evoluo jam montriĝas en konkretaj rezultoj. Por la plua prospero estas tre grava priatenti la principon: en la medio-protektado oni atingis la periodon, kiam necesas kunlabori kun la tuta socio! Estas bezonataj konkretaj agoj, kiuj efike helpas elimini la ekzistantajn mediajn nocojn, kontribuas anticipi la estontajn, tiel konservante la necesegan naturon, kies ne supertaksebla valoro estas, ke sur ĝi baziĝas la harmonia homa vivo.

RECENZOJ

WILLIAM AULD: FACETOJ DE ESPERANTO.
Eld: Brita Esperanto-Asocio, 1976. 19x14 cm, 52 p.

Tiu ĉi nova libro de la skota poeto, elstara pledanto por la Esperanta kulturo, enhavas tri eseojn kaj unu poemon. Tia kombino unuavide eble ŝajnas surpriza, sed ekkoninte la libron tamen oni sentos nenian hibridecon: la poemo, dediĉita al William R. *Harmon,* prezidanto de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, perfekte harmonias kun la eseoj.

La unua eseo — estus pli taŭge nomi ĝin studo — havas la titolon *Evoluo de la poezia lingvaĵo en Esperanto;* ĝia mallongigita teksto jam aperis pli frue, ĝuste en Hungara Vivo (1974/3.). Auld en tiu ĉi utilega studo trairas la okdek-jaran vojon de la evoluo de la poezia lingvaĵo, kaj ekzamenas, kiel tiu evoluo manifestiĝas en la originala poezi-kreado. Li trovas — prave — ke tiu evoluo estis grandega, kaj aldonas, ke »la lingvaĵo de Ragnarsson, De Kock aŭ Mattos estus neimagebla por tiuj bravaj pioniroj, kiuj aperigis siajn belajn lirikojn en la fruaj revuoj«, tamen »ĝi estas... la sama lingvo, per kiu ĉiuj kantas, kaj la evoluo ne nur okazis senperforte, sed restis ĉiam nepre fidela al la Fundamento kaj al la fundamentaj trajtoj de la unika lingvo Esperanto.« Tiu ĉi — ĝis nun nepre la plej profunda — studo devos eniri la studprogramon de ĉiuj kursoj pri la Esperanta literaturo.

Alia eseo tuŝas la tiklan problemon de la kompara literaturo, pri kiu surpaperigis siajn revaĵojn ankaŭ *Waringhien* (Eseoj I, p. 119—123). Ĉi tie Auld ĉefe polemikas kun la anglosaksa literaturisto sinteno, kiu simple ignoras la fakton, ke oni verkas literaturon ne ekskluzive en la angla lingvo. Li citas la eldiron de tiaspeca — eble tipa — brita literaturisto: »Nu, finfine, kio estas la hungara literaturo? — Kolekto de ciganaj versaĉoj.« Kaj mi citu ĉi tie la reflektojn de la aŭtoro pri tiu eldiro: »Kaj tion li diris pri unu el la plej ekscitaj, intelektaj, avangardaj literaturoj en la mondo, kiu forbariĝis por la cetera mondo pro tiuj damnindaj lingvaj obstakloj. (Eble ne estas hazarde, ke ĝuste Hungario havigis al Esperanto plurajn el ties plej geniaj tradukintoj.) »Nu, kompreneble mi scias pri tiu anglosaksa sinteno koncerne neanglajn literaturojn, tamen mia Mez-Eŭrope — do iom internaciece — edukita intelekto ĉiufoje prigapas tiaĵon kiel dukapan bovidon.

La tria eseo, *Pri transskribo de propraj nomoj* tuŝas malnovan problemon, ankoraŭ nesolvitan kaj verŝajne ne baldaŭ solvotan. Auld insistas pri la neceso esperantigi proprajn nomojn; kvankam mi ne havas nun taŭgajn argumentojn por polemiki kun li, tamen mi malemas akcepti tiun praktikon krom eble en literaturaj kuntekstoj, kion sugestas ankaŭ la mildiga subtitolo de la eseo.

La libreton fermas la menciita poemletero al William R. *Harmon.* Tiu ĉi poemo, jam aperinta en la revuo *Esperanto* (1975 decembro) estas konfeso pri pesimismo: ĉu la praktika mondo entute bezonas Esperanton? Li demandas:

... Ĉu do forĵetinte
verdstelojn desur kalsoneto,
ni ankaŭ bonajn sentimentojn
tro proskripciis en kompleto?*

Kaj sugestas:

... kriu laŭte tra la mondo —
kun digno, tamen, kaj sincere —
ke Esperanto estu lingvo
por homaranoj de la tero,

ke nur neŭtrala Fundamento,
kaj tiel plu — vi bone konas;
kaj tiel eble ni allogos
la homojn, kiujn ni bezonas.

Tre impresa poemo, kia estis siatempe eble la *En amara horo* de *Kalocsay* — ĝi lanĉas efektive la ekzisto-problemon de la tuta Esperanto-movado. Kaj li donas respondon pri ĝi, unuavide eksmode, tamen esence *moderne* esperantisman: la poemo estas sentimenta manifestiĝo de la sama dediĉiteco, kiu trovis intelektan eksplikon en la eseoj.

DAPHNE LISTER: ĜIS NUN. Originalaj poemoj. Postparolo de William *Auld.*
Eld: Esperantaj Kajeroj (Britio), 1976. 11x7 cm, 64 p.

La unua vorto, kiun tiu ĉi poemaro asociigis al mi, estis: *freŝ-tona.* Kaj post plurfoja tralego la impreso fariĝis konvinkiĝo: Lister rigardas la mondon tra unikaj okulvitroj — aŭ eble mi mem havas okulvitrojn, kiuj tro filtras la lumon? — kaj rimarkas multon, kio por la homoj ĝenerale restas kaŝita. Tamen, la rimarkitaj negativaĵoj ŝin ne malĝajigas: ŝi defendas sin foje per epigrameca spitgrimaco:

Pekadon rekompencas mort',
Atendas virton sama sort' ...

kiuj versoj kompreneble ne nepre interpretendas, kiel signo de manko de etika sinteno. Okazas, ke la tuta poemo estas nura grimaco:

Li kredis vidi Zamenhof
Kun granda verda stel'
Li rerigardis, trovis, ke ĝi
estas karusel'
»Esperas mi« li diris, »ke mi
rajdos sur kamel'.«

Aŭ alia peco:

Don Lordo
Estis ĉe la marbordo.
»Haltu« al la maro li ordonis —
Li bedaŭrinde dronis.

Sed tamen, desub la sindefendaj grimacoj foje-foje aperas konsterne belaj kaj profundaj versoj, kiel la subaj, kiuj impresis ankaŭ la postparolinton de la poemaro:

... antaŭe mi elfosis
Kadavrojn el florbedoj, nun
sufiĉas
Se katastrofo mankas, — mi
feliĉas!

Aliloke oni legas senperan konfeson:

Skeptiko savas;
En fido kaj sincero
Kuŝas danĝero;

Mezoriente, Nordirlande glavas
Fido kaj sincero, murde bravas
Gloro, heroeco, sinofer',
Modeste moka, sen esper'
Skeptiko savas.

Entute, leginda poemaro, kiu — pro la epigrama koncizeco kaj klareco de la poemoj — facile digesteblas eĉ por komencantoj kaj ĝis-ostaj nelegantoj de poezio, samtempe kapablanta doni ĝuon ankaŭ por veraj poeziamantoj.

V. *Benczik*

**proskripcii: senjuĝe ekzili*



Pál Barczi: Renkonto

SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ 1976

Eld. Budapeŝta Teritoria Komitato de HEA, kiel aldono de „Bp-a Informilo" nro Julio. Red.: dro *Haszpra Ottó D.* Sc. Prezo 40 Ft; multobl., ilustr.

La bazon de la ĉijara eldonaĵo donis prelegoj en Scienca Rondo de Klubo Konkordo en Budapeŝto, sed patroprenis ankaŭ aliaj, eĉ eksterlanda aŭtoro. El movada vidpunkto estas aparte grave, ke — en diversaj sciencoj — kompetentaj personoj, por esprimi precize: *sciencistoj* praktikas nian lingvon kaj buŝe, kaj skribe *por sciencaj celoj.* Ne estas kontesteble, ke — surbaze de nia floranta literaturo — en la Internacia Lingvo oni ege bezonas poluri kaj ampleksigi la fakan lingvaĵon en kiel eble plej multaj branĉoj.

Tia eldonaĵo kompreneble devas servi vastan publikon, tute ne taŭgus verki nur por kelkaj; nian publikon oni *devas* tiamaniere alproksimigi al scienca lingvaĵo de E-o. La redaktora tendenco, kunigi en sama libreto (70-paĝa) diverstipajn (sekve alinivelajn) artikolojn, ŝajnas tute pravigita, ĝuste pro la supra bezono koncerne la publikon. En tiu libreto ankaŭ nefakuloj trovas „facile" legeblajn bonstilajn *popularigajn* artikolojn, kiuj estas serioze — science prezentitaj temoj (pri strukturo en muziko de *L. Lesznai;* pri mikroboj de *I. Gál;* pri baŭksito, ĝia geologio-industrio, de *E. Dudich;* pri arkeologio, ĝenerale de *B. Golden).* La aŭtoroj ne neglektas elrigardi el la temo al vasta horizonto de sia branĉo, tiel sukcese fundi pli vasta la konon de la leganto. Ofte oni renkontas lingve surprize trafe formulitajn pensojn, sukcesajn terminologiajn solvojn. Frandaĵo estas la — post duonjarcento denove publikita — E-a stenografio de *L. Kökény;* eble jam per tio, la libreto havigis al si kvazaŭ bibliografiilan valoron.

Nature, la scienco pri E-o okupas centran lokon: studo de *I. Szerdahelyi* (pri morfemiko de E-o) ebligas enpenetri en la ĝuindajn profundaĵojn de la Zamenhofa kreaĵo; dum legado ni admiris ties substilecojn laŭ la severa analizado de science bone ekipita lingvisto. Legi kaj studi tiun studaĵon estos certe por multaj seriozaj lingvo-studantoj ne forlasebla bezono.

Fine, sed ne laste, kio ŝajnas kroni tiun kolektaĵon: ekscitaj raportoj pri freŝaj, daŭrantaj sciencaj esploradoj informantaj ofte ankoraŭ pri ties unuaj fazoj, precize kaj science bazite (d-roj L. *Molnár—G. Nyerges,* É. *Stancz)* pri medicinaj, resp. psikaj ekzamenadoj, kun ilustraĵoj. L. L. Medvedev, aspiranto de Moskva Universitato sendis koncizan raporton, biologio-kemio-teman. *O. Haszpra* mem per grava teoriopriskribo, altnivel-scienca studo prezentas sin (pri hidroelastikeco), krome per universitatgrada ĉapitro por inĝenieroj pri statiko. En ĉiuj ĉi montriĝis altaj lingvaj pretendoj de la aŭtoroj, krom kelkaj preserariaj retoj, manko ne estas menciebla! Oni aldonis bibliografiojn, resumojn en aliaj lingvoj, kiuj estos venontfoje pli unuece, pli konsekvence elektitaj. Entute: grava kaj signifoplena donaco al la faka literaturo.

Ervin *Fenyvesi*

SALO-DISSUTILO

Tipoj: STA/3 HDTL
STA/4 HDTL
STA/5 HDTL



Teknikaj indikoj:

Tipo	Enhavo-kapacito (m^3)	Neta-pezo kg	Ŝarĝo-kapablo kg	Tuta pezo kg	Kamiontipo rekomendita
STA/3 HDTL	3,4	1030	3600	4630	D—452 ZIL—130 +
STA/4 HDTL	4,0	1050	4800	5850	+ +
STA/5 HDTL	5,0	1080	6000	7080	+ +

— Serie fabrikata (3,4 m^3) tipo.

— Fabrikataj nur laŭ mendo. Tiujn porti estas bezonataj aliaj kamiontipoj kun konvena ŝarĝ-kapablo.

La salo-disŝutilo estas dum kelkaj minutoj metebla (aŭ demetebla) sur platformo de kamiono, pere de teleskopa kvarpiedo. Ties alteco estas regulebla per mana kranko.

Interne de la cisterno helica transportilo kaj de-aksa frakasilo diserigas kaj dozadas la salon je grama precizeco. La instalaĵo estas teleregebla el la ŝoforkupeo. La hidraŭlikan mekanismon provizas aparta motoro.

Ŝuto-larĝeco: modulebla je 2, 4, 6 kaj 8 m.

Ŝuto-kvantoj: reguleblaj laŭ gradoj de 10, 20, 30 kaj 40 g/m² — helpe de aparta aŭtomatismo — sendepende de la vetur-rapideco. Laŭnecese eblas elŝuti eĉ pli grandajn kvantojn.

La disŝutado estas multe variebla, modifante la rotacion, krome per aliigo de la eliga tubo. Antaŭen aŭ dorsen veturante egale eblas disŝuti.

Turnante la ŝut-diskon ĉirkaŭ siaj horizontala kaj vertikala aksoj, eblas disŝuti ekzemple sub sia veturilo, aŭ precize alŝuti sur malvasta zono, ekz. sur vojorandon.

Indikoj pri disŝutado

de unu tuno da salo

Kvanto g/m²	Ŝut-kovrita aero m²	Ŝuto-longeco, se la zono-larĝeco 4 m	6 m
10	100 000	25,0 km	16,6 km
20	50 000	12,0 km	8,3 km
30	33 000	8,2 km	5,5 km
40	25 000	6,2 km	4,1 km

ÚT TRÖSZT KÖZGÉP

KÖZGÉP

Közúti Gépellátó Vállalat

Entrepreno pri ŝose-konstruaj maŝinoj

H—1734 Budapest, XX., Haraszti út 277.

Tel.: 278-250, Telex: 22-4035

Paĝo de FERI'

PROVERBOJ



En la ĉefaj linioj de nia enigmo — hor. 1. kaj vert. 1. — ni kaŝis du proverbojn el Proverbaro Esperanta.

Sendi sufiĉas la solvon de tiuj proverboj ĝis la 20-a de majo. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj linioj: 14. Spirebla nesimpla gaso, medio de la vivo. 15. Havi koran inklinon al iu. 16. Ĵeto per ilo celante vundi aŭ mortigi. 17. Reen: en kiu loko? 18. Miksita ago. 19. Estro de monaĥejo. 21. Subjunkcio. 22. Ektuŝegu per rapida forta movo! 23. Sufikso. 24. Rilata al helena filozofo, majstro de Aristotelo. 26. Granda Afrika rabobesto (Radiko). 28. Granda helena filozofo kondamnita je morto per cikuto. (470—399) 29. Ne estis certa pri ekzisto, realeco de io. 31. Rilata al superhoma estaĵo. 33 Sufikso. 34. Ago de ino, kiu naskas antaŭtempe nevivopovan idon. 36. Kemia simbolo de Radiumo. 37. La intelekto, kontraste al la korpo. (R) 38. Rilata al flanka parto de la nazo. 39. OU. 40. Nedifina pronomo. 41. Ne tute. 42. Forta ligna stango, oni starigas ĝin en la teron. 44. Maldika rostita tranĉaĵo de bovaĵo (R) 47. Sufikso. 48. Kaverno, 50. Ĝenas, enuigas. 52. Radiumo. 54. Magma rokspeco, tre forta. 57. Pompa, 58. Vido de tio, kion oni serĉas. 60. DD. 61. Reen: interjekcio. 63. Rezulto de pilkludo (R) 64. Germana inĝeniero, inventisto de la benzin-motoro (1832—1891). 65. Prepozicio. 66. Kiu lerte trompas, ruze ŝtelas (R), 68. Konjunkcio. 69. Prepozicio 70. Pli malfrue. 72. Pruvi per dokumento ies identecon (R). 73. Orienta brando, distilita el fermentita rizo (R) 75. Koloneto al kiu oni ligis krimulojn por montri ilin al la publiko. 77. Subjunkcio. 78. Vulkano en Sicilio. 80. TT 82. Membro de la Hitlera nacisocialisma partio. 83. Mallongigo de soveta presagentejo. 84. Cilindra metala peco, uzita por solide kunfiksi lamenojn (R) 85. Motoro de la sangcirkuliga sistemo. 87. Vira vesto de la antikvaj Romanoj (R) 88. Dekduo da dekduoj.

Vertikalaj linioj: 2. Grandaj Afrikaj rabobestoj. 3 Esperanto Rondo Amika fondita de Baghy 4. JO 5. Malaltigo de la prezo, kion cedas la vendanto. 6. Ne profesiulo. 7. Kiel 84. — sed la tuta vorto. 8. AP. 9. Iri de unu loko al la alia, (R) 10. Amatino de Hamleto 11. TO. 12. La homo de ... talo: prahomo vivinta dum la paleolitiko (en valeto apud Rejno) 13. Laŭvorte rediri. 19. Diafaneta variaĵo de gipso, similanta marmoron. 20. Moviĝanta akvomaso. 22. Prefikso 24. Primitiva sistemo de parolo, uzita de iamaj homoj. 25. Oro. 27. ES. 30. Antaŭa parto de la homa trunko. (R) Adjektiva formo de 45. (R) 35. Longa, kava cilindroforma ilo por konduki materialojn (R). 37. Tubforma pasto el tritika faruno. 38. Kiel horizontale. 40. IF. 41. Arto instrui kaj eduki la infanojn. 43. Rilata al valora metalo. 45. Sufikso de la aktiva preterita participo. 46. Reen: sciigi al iu, ke oni deziras ricevi ion (R). 49. Hulas. 51. Vulgara nomo de natria klorido (R). 53. Praktika apliko de scioj, reguloj per verkoj. 55. Sufikso. 56. Mezo de foiro! 59. Itala havenurbo ĉe rekonto de Adriatika kaj Jona maroj. 62. Scienculo, kiu esploras la ĝeneralajn principojn de la mondo. (R) 65. Persono posedanta la plej altan universitatan rangon (R) 66. Supernatura estaĵo, (R) 67. Tiu punkto de la orbito de planedo, en kiu ĝi estas plej proksime al la Tero, (R). 68. Decidi pri io (R). 70. Protaktinio. 71. Konsonantoj de 79. 74. Duono de robo! 76. Rilata al longa mallarĝa kaj maldika peco de ligno, materialo por ĵaluzio. 79. Ideala modelo de ia speco. (R) 81. Adverbo por la superlativo. 83. Multope 85. KF. 86. Unuo de elektra rezistanco (R). 88. GI.

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 76/5 estas: „Fiŝo pli granda malgrandan englutas" kaj: „El du malbonoj pli malgrandan elektu".

Pere de lotumado libropremion gajnis: Henk Diender el Nederlando, Ebel Vladimir el Sovetunio kaj Julianna Serbán el Hungario.

La solvo de Lingvaj ludoj el la sama numero: „Bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno" kaj „Forĝu feron dum ĝi estas varmega"

Libropremion gajnis: s-ino Terttu Tyynela el Finnlando kaj József Cseh el Hungario.

Lingvaj ludoj

"Nomen est omen„ — aŭ iom ankoraŭ pri anagramoj

En HV 76/2. ni prezentis la anagramo-ludon, kiu gajnis la plaĉon de niaj legantoj, kunludantoj. Tiam pro manko da sufiĉa spaco ni ne povis detale priskribi la ludon jam historian.

En la antikva kaj mezepoko oni diris kaj kredis, ke la anagramoj faritaj el nomoj havas sorĉan forton kaj kvazaŭ determinas la sorton de la nomata persono...

Legu atente la sekvan anekdoton kaj juĝu mem:

Mario la Straba, la mondkonata, fifama, kripla kaj malbonokula pirato staras antaŭ la Internacia Esperanta Tribunalo. Teruraj pekoj ŝarĝas lian konton. Kion vi povas mencii por vin defendi? — demandas la ĉefjuĝisto. La pirato — ŝajne ricevita iam bonan edukon kaj instruon — kvazaŭ fatalisto akuzas sian alnomon dirante: „la anagramo farebla el mia alnomo destinis min fariĝi pirato. (Unua demando: kiu anagramo?). Post iom da tempo la ĉefjuĝisto respondis: — Ne la anagramoj kulpas, sed vi mem, ĉar vi elektis el multaj variaĵoj nur la plej konvenan por defendi viajn pekajn inklinojn. Kial vi ne obeis al iu alia anagrama variaĵo, kiu aludas pri via kripleco, kaj destinus vin por esti homo, kiu kultivas arbojn kaj arbedojn? (Dua demando: kiu estas tiu variaĵo?)

Ni petas alsendi la solvojn de la du demandoj.

ŜAKO

"Gens una sumus" – Unu gento ni estas

Rubrikestro: d-ro Jozefo Németh

4-a numero

Comins *Mensfield*

(Anglio)

— originala —



Mato en 2 movoj (Bl. komencas)

Bl.: Rh3, Da6, Tc2, Kf6, Ča8, a2, d3, d5 (8)

Ng.: Rc5, Db3, Čc3, a3, a4 (5)

Limdato de la solvo: *10-a de marto 1977.* (Sur la koverton „ŜAKO") Ĉiujare ni donos premiojn en 3 okazoj (po 2 pecojn!) Post la bonaj solvoj de la unua kaj dua problemoj gajnis premiojn per lotado: D-ro Jozefo *Németh,* Kalocsa (Hungario). Partoprenis 26 personoj el ok landoj kun 44 solvoj.

La solvo de la 3-a problemo: ne estas bona I. Rd6? (Kf5!). Konvena movo: *I. Rd4!*

La 8an (1977) Ŝakfestivalon de EŜLI oni aranĝos en Germanio, la 9an (1978) en Hispanio, la 10an (1979) en Hungario — en urbo *Kalocsa.*

En 1977 komenciĝos la dua turniro de EŜLI-teamoj. Laŭ landoj povos partopreni po 1—2 teamoj. Membroj de la teamoj devas esti membroj de EŜLI (v. HV 1976/6.). La Hungarlanda teamo konsistos el 4 ludantoj. Teamestro: d-ro Jozefo *Németh* (H — 6300 *Kalocsa, Szabó J. u. 3.)*

Kiuj deziras korespondi pri ŝako, bonvolu skribi tiun deziron al la rubrikĉefo, kiu volonte peros inter iu ajn. lando.

Ŝak-leksikoneto (4): Revuo „Esperanta Ŝako" (EŜ) de EŜLI, aperos jare po 4 numeroj. Ĝia formo estis ĝis nun ĉefe A/5. La revuo enhavas diversajn interesajn rubrikojn: ŝaknovaĵoj, alvokoj, korespondaj turniroj, ŝakpartioj, ŝakproblemoj, ktp.

Revuon Esperanta Ŝako povas ricevi nur membroj de EŜLI, do aliĝu! La numero 1977/1 estos eldonata en Hungario, en *Kalocsa.*

Mallongigojn kaj signojn de ĉi rubriko vidu en HV 1976/4, 5, 6.

Landa Esperanta Ŝakgrupo fondiĝis en urbo *Kalocsa* dum du-taga bone organizita ŝak-programo (1976—11—18/19.). Jam 50 ŝakludantoj aliĝis el la tuta lando al tiu fakgrupo, kies unuan membrokunvenon flanke de HEA salutis Jozefo *Szekeres;* ĉeestis ankaŭ prezidanto de EŜL, J. *Fiala* el Ĉehoslovakio, krom elstaraj ŝakistoj. Estis eliktita prezidanto d-ro Jozefo *Németh,* estro de nia rubriko.

Aperos internacia bulteno de EŜL, kaj turniroj ofte. Tiutage rapidturniron gajnis la hungara virina ĉampiono, Éva *Karakas,* internacia majstro (vd. foton). Ŝia partopreno levis la nivelon forte: ludis ankaŭ simultanon kun granda sukceso kontraŭ 20 partneroj (nur unu membro venkis ŝin).

KALENDARO

1962—02—06 Antaŭ 15 jaroj mortis Jean *Ribillard,* franca esperantisto, aŭtoro de la grandsukcesa romano „Vagado sub palmoj".

1847—02—16 Antaŭ 130 jaroj naskiĝis Thomas Alva *Edison,* mondfama Amerika inventisto de mikrofono, fonografo, elektra lampo kaj aliaj inventaĵoj.

1907—02—16 Antaŭ 70 jaroj naskiĝis Giosué *Carducci,* itala Nobel-premiita verkisto, poeto.

1907—02—19 Antaŭ 70 jaroj naskiĝis Paul *Neergaard,* dana esperantisto, verkisto, vortaristo. Akademiano.

1817—03—02 Antaŭ 160 jaroj naskiĝis János *Arany,* genia hungara poeto. Vidu HV 63/1.

1967—03—06 Antaŭ 10 jaroj mortis Zoltán *Kodály,* hungara folkloristo, komponisto, muzik-pedagogo. Vidu HV 62/4. kaj 67/2.

1902—03—14 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Imre *Baranyai,* hungara esperantisto, poeto kaj verkisto. Vidu HV 62/2.

1967—03—17 Antaŭ 10 jaroj mortis Julio *Baghy,* hungara Esperanta poeto kaj verkisto. Vidu HV 74/5.

Komp.: L. *Rieth*

Humuro

Kun vinagra vizaĝo homo sidas ĉe la drinkbara breto kaj elversas sian koron al la miksisto.

— Mi eksedziĝos. Je l'ĉielo kaj infero, mi eksedziĝos.

— Kial do? — demandas la miksisto enue.

— Hieraŭ mi hejmeniris senatende. La pordo estis ŝlosita de interne. Vane mi frapedatis. Mia edzino min simple ne enlasis. Mi eksedziĝos kaj — fino.

— Oni ne devas atribui tiel grandan signifon al la afero. Vi vidos, ke ĝi havis kaŭzon tute simplan. Eble via edzino ne estis sola.

En aŭto-riparejo.

— La bremso de mia aŭto estas malbona.

— Ni ĝin riparos ĝis la fino de la semajno.

— Ĉu oni ne povus pli frue...

— Ne; rigardu, kiom da aŭtoj ĉi tie staras.

— Sed mi havas ege urĝan vojon.

— Se via vojo estas tiel urĝa, kial por vi la bremso?

* * *

— Kial propre vi havas fervojan horaron, se ĉiuj trajnoj malfruas? — indignadas pasaĝero.

— Tio estas ja klara: tial, ke ni sciu, kiom ili malfruas — respondas fervojisto.

LETERKESTO

MANUSKRIPTOJN abunde ricevas nia redakcio el la tuta mondo kio atestas multe pri konfido koncerne la kulturan, literaturan gravecon de nia revuo. Tamen: bonvolu konsideri, ke — kvankam HV malfermas al la vasta mondo siajn paĝojn — la revuo aperas nur en ĉiu dua monato! Tio devigas nin severe, selekti, principe laŭ arta nivelo, kaj tio postulas multe da tempo de la redakcio, t. e. la serioza lektorado de personoj havantaj alian profesion dumtage. Ni petas de la eventualaj kunlaborantoj *paciencon:* pli urĝe ni apenaŭ kapablas plenumi nian devon, nepre zorgeme faratan. Dankon!

Al multaj karaj legantoj: ni sincere dankas la bondezirojn okaze de la nova jaro, kion Vi tiom multe esprimis! Ili estu reciprokataj al Vi ĉiuj, en la signo de la espero al nia grava afero!

N. *Starodubcev*, SU: multaj konsentas vian opinion pri *reklamoj* en HV; utilaj jen pro la faklingvo, jen informiĝi pri produktajoj de la hungara industrio ĝenerale; helpe de ili E montriĝas pli praktika, kaj la revuo pli moderna akiranta plian financan bazon (ĉu superflua por E-gazetaro?). Plurlingvaj *fakvortaroj* estas ofte eldonataj en Hungario, ties eldon-programon ni ne konas; pridemandu ĉe la fama librejo soveta „Internacia Libro". Seslingva komputilvortaro (hungara eldono) enhavas ankaŭ Esperanton, pri aliaj fakvortaroj ni ankoraŭ ne aŭdis similan.

Ernst *Diedrich*, DDR-2723 Warin: ni komprenas vian entuziasmon por scienc-fikciaĵoj, resp. por tia numero de HV (1976/2.). Ni klopodos ankaŭ venonte laŭeble aperigi sciencfikciaĵojn. Tamen neniel konsideru tiujn verkojn „precizaj" priskriboj de venonta socio; la literatura valoro tute ne troviĝas en profeta trafo. Tio koncernas same la *Vojaĝon al Kazohinio*, kies fragmento ironiis precipe pri historio! Tiu romano estas aĉetebla ĉe UEA.

Tore Johansson, Svedio 38100, *Kalmar: se* nia revuo donis por vi „multan ĝojon kaj iĝis unu el la ĉefaj legaĵoj", nin same ĝojigas; permesu nin peti, sendu foje informon pri la vin plej interesantaj kaj plezurigintaj artikoloj. Antaŭdankon!

Esperanto-Klubo en Minsk, SU (Valerij Šiško vicprez.) kaj *Martin Schüler*, GDR-1532, *Kleinmachnow:* la supra peto viaflanke jam plenumiĝis, vi ja detale menciis kaj aprezis la artikolojn de HV. Do: vi „ĝuas la lingvaĵon de HV" (ni vidas tamen tiurilate niajn devojn kaj farendojn!), elvokis plaĉon la numeroj dediĉitaj por *F. Szilágyi*, resp. *L. Tárkony*, i. a. ankaŭ noveloj kaj poemoj de hungaraj verkistoj; la *Revuo de revuoj*", enmiksanta rimarkojn pri vortfarado kaj gramatiko, per sia ĉarme ironia tono refreŝigas koron kaj menson". Ni dankas ankaŭ la prilingvajn rimarkojn!

E. Green, Anglio, Greenford: Literatura Mondo prave estas jam „legenda" en la historio de E; vi aldonas, ke HV ankaŭ estas *legenda* (ne nur leginda) — kompreneble en alia senco de la vorto. Enbindigi HV-numerojn por havi ilin ĉemane, ŝajnas sekvinda ideo, ankaŭ tial, ke pruntedonitaj numeroj ne perdiĝos el la HV-volumo!

Al pluraj: la redakcio ne okupiĝas pri distribuo de HV! Sekve abonantoj devas reklamacii (ne-alvenon, mankon ktp.) ĉe distribuejo: en socialismaj landoj ĝenerale *ĉe la poŝtoagentejo* (en Hungario same); abonantoj el aliaj landoj turnu sin al Entrepreno KULTURA Budapest. kies adreso troveblas en ĉiu numero sube de lasta paĝo. Bonvolu elekti tiun rekomendon: pli rapidan plenumon ebligas reklamacio ĉe ĝusta loko!

Saulcerite *Neilande*, SU-Latvio, Riga: ĉu kvanto aŭ kvalito de E-gazetaro efikas pli la publikon? Certe ambaŭ, tamen neeblas efektivigi samtempe en konvena maniero; tial konkludis ankaŭ Aldo *di Giorgi* (76/3. nro) pri necesa koncentrado internacia. Naciaj revuoj zorgu pri vasta propagando inter samlingvanoj, sed bonnivele! Varienhavaj bildrevuoj bezonas egan aparaton kaj kapitalon; ne mirinde do, ke la ĝisnunaj iniciatoj, eĉ meze de abonjaro, perdis sian elanon. Ni daŭrigas kaj la diskuton, kaj la agadon por grave progresigi la E-gazetaron.

Bertil *Englund*, BRD-8670 Hof: prave, ke lingvo povas servi por kia ajn celo, almenaŭ principe. Sekve, la Internacia Lingvo devas esti utiligata en la plej diversaj aferoj kaj temoj, plenumante multspecajn praktikajn bezonojn „same nature kiel aliaj lingvoj" laŭ via trafa esprimo. Ne la uzon de Esperanto, sed eventuale la misajn ideojn kaj pensojn oni refutu, esprimitajn en kia ajn lingvo, la enhavo ja ne dependas de la lingvo.

Itoo Hideharu, Tokio 171; *Stano Marček*, Čehoslovakio, *Martin kaj aliaj:* la eldonplano de HEA, kiun ni publikigis, estas firma, tamen ankoraŭ ne realigita. Viaj libro-mendoj estas do fruaj, sed kun la multaj reeĥoj forte helpos efektivigi la planon, kaj montras, ke ni elektis eldoni bezonatajn kaj atendatajn verkojn.

Ryszard Dolinski kaj *Krysztof Mazurek*, prez. de pola Vojevodia E-Klubo en *Rzeszov*, resp. de la Junulara Sekcio; *Ferenc Fleck* ŝakmajstro, Budapest: dankon pro instigoj kaj apogoj por nia ŝak-rubriko, same pro enzuziasma raporto pri veturo en Hungario inter esperantistoj.

Korespondi deziras

El GDR: geĝemeloj Jörg kaj Birgit *Brosche* (14-j.), 7981 Rückersdorf.

El GFR: s-ro Hans *Flassbeck*, 53 Bonn I, pf. 1542, pri vivproblemoj (celoj, vojoj, taskoj, vero).

El Pollando: f-ino Emilia *Wojtakowska*, pk. 312, PL 50—950 Wroclaw 2, sistema kolektantino dez. interŝanĝi E-revuojn k librojn. — S-ro Ryszard *Wójcicki*, oficisto, str. Chorzowska 8m 3, 41—902 Bytom, pĉt.— S-ino Roza *Palka*, str. Miczurina 53/1, 40—415 Katowice, instruistino pĉt. — S-ro Piotr *Kolodziej* malnova E-isto, fraŭlo, 44—100 Gliwice, str. ZWM 18m 2, pĉt. — S-ino Tedozja *Nowak*, 40—374 Katowice 14, str. Wiosny Ludów 25/93, oficistino pĉt. — S-ro Alfred *Wittek* (33-j) 41—902 Bytom, str. Starowiejska 6m 10, pĉt. — S-ro Ryszard *Czajkowski*, fraŭlo, Bytom, str. J. Koniewa 17/6, pĉt. — S-ro Tytus *Monasterski*, malnova filatel. kol. pm »mar-temo«, 41—902 Bytom, str. Wolnosci 13. — S-ino Halina *Wiltos* (26-j) instr. 32—333 Slawków, str. Kvartowska 2A, pĉt. — F-ino Zofia *Starczewska*, ciganino, str. Bluszczova 2m 7, Bytom-8, pĉt. — F-ino Danuta Mincewicz (17-j), 21—500 Biala Podlaska, ul. Stonezna 1, pri turismo, libroj, filmoj, ankaŭ ruse, germane.

El Kubo: s-ro Felipe *Felipe*, Havano 4, Calle 23, No. 1613 apt. 31. e) 28 y 30 Vedado, pri kutimoj, interŝanĝo de pm. bk. kaj gondiskoj de moderna muziko (fraŭlo 27-j. tekstildesegnisto).

3-a Internacia literaturkonkurso „LARIUS"

Esperantlingvaj sekcioj: — Sekcio B: Libertemaj poemoj originalaj. Sekcio C.: Poemoj tradukitaj el kiu ajn lingvo.

Por partopreni oni sendu unu aŭ du poemojn, en ses kopioj, el kiuj nur unu kun nomo, adreso, subskribo (tradukaĵoj kun aldona originalo) al ĉi suba adreso:

Konkurso LARIUS, C. P. 80, I—22100 Como, (Italio)

Limdato por ekcepto: 15-a de aprilo 1977. Premioj: diplomoj, pokaloj, ŝildoj, oraj kaj arĝentaj medaloj. Partopreno senpaga por ne-italoj. Elstaraj internaciaj juĝkomisionoj.

LEHEL

LIZENZ BOSCH HAUSGERÄTE

La Fridujfabriko plilongigis la serion de mastrumaj fridujoj.
Jen la du unuaj tipoj de la nova produktaj-familio:

1. 160-litra, dustela-, kun 18 litra ultrafrigidejo ĝis —12 °C; produktita surbaze de BOSCH—licenco; prezo: 5170,— Ft.
2. 200-litra, dustela, kompresora fridujo-, kun 18 litra ultrafrigidejo ĝis —12 °C; prezo: 5640,— Ft.

Gyártja: Hűtőgépgyár

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en subaj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto internacie ŝangebla

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27., kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért